



## LITERATURA SERIO

### ENHAVO:

*Ĥ. Smirnenski*: Karbfosisto. Vers. El bulg. trad. A. Las.  
 — Ĝon Mateus. Trad. de M. Draznin. — *N. Barthel-*  
*mess*: Pro aero kaj suno. Orig. — *K. Johansson*:  
 Kunulino. Vers. orig. — *Al. Barta*: Enirkarto por  
 la ĉiellando. Trad. Herczog. — *D. Glizer*: Arto kaj  
 Socialismo. Orig. — *Ernesto Drezen*: Historio de  
 la Mondolingvo. El la rusa lingvo trad. N. Hohlov.

Ĝenerale redaktis N. Nekrasov.

Redakcio: 14, Avenue de Corbéra, Paris, XII-e (Francio)  
 Administracio: R. Lerchner, Colmstr. 1, Leipzig O 27 (Germ.)

---

# REDAKCIA ANGULO

Nova revuo? — Jes, nova — laŭ aspekto kaj amplekso, nova laŭ la forto, kun kiu ĝi estas disĵetata sur la tutan terglobon, ĉien, kie oni parolas la esperantan lingvon, — tiu ĉi sola esperantista literatura revuo en tutmondo! Sed jam konata kiel malnova amiko laŭ la spirita, laŭ la idea flanko al la plejmulto da legantoj, kiuj tenis fidelecon al ĝia antaŭirinto: “Sennacieca Revuo“, kaj kiuj nun venis por preni ĝin en la nova, multpromesanta vesfo...

Rapide ni efektivigis la decidon de la Göteborga SAT-Kongreso, faritan bonpripense kaj bonintence, por doni kun la nova aspekto novan, freŝan vivon al tiu grava kaj unika SAT-organo. Ne longa tempo forpasis depost la tagoj de l' 8-a Kongreso, kiu decidis pri la estonta vivo de l' revuo, kaj jam en la septembra kajero de “S. R.“ ni povis sciigi al la legantoj de tiu revuo pri la ĝojiga decido. Sed, en tiu ĉi unua kajero de “La Nova Epoko“ ankoraŭ ne ĉio estas tiel transformita kaj rekreita, kiel promesis nia septembra anonco. Ni ne antaŭvidis, ke K-do Nekrasov, la fakredaktoro por la plej grava, la literatura serio, kiu persone ĉeestis la Kongreson en Göteborg kaj tie donis la raporton pri la stato de “Sennacieca Revuo“ kaj prenis sur sin la zorgon reorganizi ĝin ĝisradike, ne povis reveni ĝustatempe al Moskvo, por prilabori la materialon por la oktobra kajero. K-do Nekrasov restis ĝis ĉ. 20. septembro en Centra Eŭropo kaj nur ĉ. la 26. revenis al Moskvo. Tute evidenta do estas la neebleco kompili la oktobran kajeron de novaspekta revuo dum kelkaj tagoj, kiuj restis ĝis liverado de la manuskriptoj al la presejo. Sekve la unua kajero de tiu ĉi nova impona SAT-organo, LA NOVA EPOKO estas redaktita kaj kompilita en Parizo; ni esperas, je la kontentigo de ĉiuj legantoj.

Nun la devizo estas: Varbi, varbadi! Ni faris fortostreĉon, ni liveris al vi belaspektan, riĉenhavan kajeron por tre malalta prezo. Nun estas via vico, malnovaj kaj novaj legantoj, helpi al ni fortikigi la financon bazon de la entrepreno per senlaca varbado de novaj abonantoj! Prenu ĉemane la tarifon (presitan sur la tria kovril-paĝo) kaj iru kun ĝi al viaj esperantistaj konatoj. Ĉiu, kiu ŝatas legi seriozan, nuntempan, socian literaturon; kiu interesiĝas pri aktualaj demandoj de sciencoj kaj edukado, estu varbata kiel abonanto! Man' en mano ni laboru!

N. B.



## KARBFOSISTO

FRISTO SMIRNENSKI

*Malsupren! Malsupren! Malsupren!  
En la abismojn malvarmajn,  
Kie nuda sklavaro en pen'  
Boras karbmurojn alarme;  
Kie svingas brakoj fortikaj  
Kaj bat' ilia sonoradas  
En malhel' de kavoj timigaj,  
La fratoj senĉese laboras,  
Kun protest' por ripozo sen ĝen',  
Por aero, vastaĵoj, — sopiro —  
Malsupren, malsupren, malsupren,  
malsupreniru!*

*Malsupren — en la nigrajn uterojn  
De l' teropatrino vi iru,  
Kaj tien alportu espérojn —  
En maron de eterna korŝiro,  
Kaj via lampeto tre pala  
Ekbrilos samkiel helstelo,  
Kaj tuj forŝiros la vualon  
De l' labortemplo malhela, —  
En la profundojn subteren,  
Kie la sun' ne rondiras —  
Malsupren, malsupren, malsupren,  
malsupreniru!*

*Kaj tie centjaraj alterne  
Kreadis tavolojn sen fin' —  
Ĉi-nigraj tavoloj sin sternas,  
Senlimaj kaj mutaj ĝe ni,  
Kiujn elteksis la vivo  
Je tapiŝ' nigra malmola,  
Kaj kiuj konservas soifon,  
Kiu je fajro ekbolos.  
Vi tie per batoj fidelaj,  
Disrompu, detruu senlime,  
Tavolojn nigrajn, malhelajn,  
ĉi-sklavanimojn!*

*Kaj en la ardon de la batalo  
Vi ĵetu ŝtonkarbegon  
Kaj haltu por vidi tra l' valoj —  
Kiam en nebul' kaj tego,  
Ekbrilos riveroj akvozas  
Kaj ondoj ruĝaj portataj,  
Minace en marŝ' furioza,  
Ekŝprucos sur ĉiujn mondpartojn,  
Kiam en briloj denovaj  
Ekbrulos, ekbolos la tero  
En fajroj, fajroj, fajroj — kaj  
pluvo fajrera! . . .*

El la bulgara trad. A. Las.



# ĜON MATEUS<sup>1</sup>

Densaj estas la rosoj ĉe la bordoj de la meksika golfo. Fru-matene fleksiĝas tie la branĉoj de la arboj. La nokto estas sufoka. Kiam tagiĝas, tuj komencas zumi miriadoj da muŝoj, bojas hundoj. La noktojn pasigas la malfeliĉuloj en kaĝoj, kiuj staras sur radoj. Ili vekigigas samtempe kun la hundoj kaj insektoj, frotas la okulojn, rigardas ĉirkaŭen; sed en ilia rigardo mankas la vigleco kaj la kontenteco de l' vivo. Ilia horizonto estas tre mallarĝa. Ili havas eblecon vidi nur unutonajn marĉojn kaj vicojn da longbranĉaj pinoj kun blankaj entranĉaĵoj, kiuj troviĝas kelke da futoj super la tero. Sub la entranĉaĵoj staras ujoj por kolekti rezinon fluantan mal-supren. Krepuske ricevas la entranĉaĵoj tre fantazian konturon; ili iĝas tiam kopiaĵoj de vizaĝoj, kurbigitaj de grimaco aŭ de ridego, tre ofte ili similas la severan vizaĝon de la ĉefo, kiu administras la arestejon.

Proksimiĝas la nokto. La noktgardistoj salutas la tagajn kaj enrampas surgenu en tendojn, kiuj troviĝas malantaŭe de la kaĝoj kun la negroj. La gardistoj esperas almenaŭ iom dormeti ĝis alveno de la brila sunvarmego.

La marĉo malsanigas la homojn. Pro ĝiaj putrigaj miasmoj, disfaliĝas la vivĝojo kaj la vigleco. En la malseka aero ŝvebas la odoro de kuirita kafo. La ununura blanka arestito estas kuiristo. Li havas ankaŭ helpanton. El la kuirejo estas aŭdeblaj la ordonoj de la kuiristo al lia helpanto.

Malfermiĝas la pordoj de la kaĝoj kaj dudek tri negroj-arestitoj eliras el siaj moveblaj tomboj. Ili portas tage kaj nokte samajn vestojn; jakojn kaj pantalonojn kun blankaj kaj nigraj strioj. La tagon pasigas la negroj kiel hundoj, — ne vole eltiriĝas, murmuras kaj atendas matenmanĝon. Kelkiuj puŝas unu la alian ĉe la fonto kaj ili al si lavas rapide la vizaĝon. Aliaj trinkas soife el siaj kunmetitaj manplatoj. Iliaj nigraj korpoj estas diversaj: longaj, mallongaj, dikaj, malforta, muskolaj. Sed ilia valoro estas ĉi tie, en la arest-valo, sama: rompita monero, — krom la aldonprezo por ilia laboro al la terebinto. Tre aflikta la ĉiama ĉeestado de la gardistaro, kiuj havas pafilojn, kiuj mortpafas, ankaŭ okuloj, kiuj spionas seninterrompe. Kion povas fari senarmila negro? . . .

Unu, du, tri — unu post la alia, laŭ la ordo, iras la malliberigitaj por ricevi la matenmanĝon. Tason da fumigita kafo, pecon

---

<sup>1</sup> La aŭtoro estas negro. Tiu ĉi rakonto ricevis la unuan premion en 1926 en la ĵurnalo "The Crisis", kiu servas en Usono al la liberig-movado inter la negroj.

---

da porkviando kaj malgrandan pecon da maizpano. Ili maĉas kaj lekas la dikajn lipojn. Estas klare: estas necese manĝi, manĝi ĉiam plu kaj plu por ne morti. Matenmanĝas ankaŭ la gardistoj, ili manĝas kaj gardas. La unuaj sunradioj tuŝas la supraĵon de la pinoj. La ombroj, kiuj aliĝis la arbojn, estas senkoloraj. La arestitoj manĝas ŝilente, ĉagrenite.

La senĝojeco de l' ĉirkaŭaĵo malĝojigas ankaŭ la gardistojn. Nek ripozo, nek virinoj, nek preĝejo. Gardi aŭ dormi. La tuta vidaĵo estas sama: sama marĉo, samaj altaj arboj, kiuj ŝirmas la sunon, sama aro da blankuloj por gardi kaj nenion fari, sama aro da nigruloj por labori kaj sidi malantaŭ kradoj. Sed la vivo postulas la sian. Kiom dezerta estu la ĉirkaŭaĵo — la negroj havas sian konsolon: la perditaj amuzaĵoj estas kompensotaj.

Arestito n-ro 1. Li estis punata pro alkoholvendo. La puntempo — ses monatoj. Lia mastro sendube liberigos lin de la terebintelĉerpado post kiam finiĝos lia aresttempo.

Arestito n-ro 3. Malmulte da esperoj. Senfortulo, lia puntempo estas longa — lia sana nigreco paliĝas, li fariĝas jam griza.

Arestito n-ro 13. Li mortigis sian konkurinton. "Du jaroj da deviga laboro" diris la juĝisto. Sed tre ofte oni forgesas ĉi tie la difinitan templimon, intersciigas mallaŭte la arestitoj, ĉar la arboj donas grandan profiton, do devas esti homoj por kolekti la rezinon.

La kuiristo nutras la hundojn. Tio estas amuzo por ĉiuj. La hundoj bojas, murmuras, kaj la bruo malaŭdebligas la kvietan murmuron de la negroj. N-ro 23 diras al n-ro 22: "Unu el ni estos mortigita: mi aŭ la ĉefo." N-ro 2 averte flustras al 23: "Kion ni povas fari? Nek ci, nek mi ion povas fari."

La hundoj ĉirkaŭas la manĝaĵon; ili mallevas la kapojn, elŝovas la piedojn, la grandaj forpuŝas la malgrandajn. Ili bezonas pli da manĝaĵo, iliaj kuntiritaj ventroj postulas pli kaj ili havas pli da rajto ol la malgranduloj. La murmuro transformiĝas en murmurigon kaj komenciĝas batalo. La okuloj de la arestitoj brilas. La gardistoj ankaŭ estas kontentigitaj per ĉi tiu spektaklo. Granda blanka hundo akiras per siaj akraj dentoj la venkon. La venkitaj hundoj forkuras ĉiufanken kaj lekas siajn vundojn. "La hundoj estas timuloj, kiel la negroj" diras la gardistoj. N-ro 22, kiu ne delonge estis liverita ĉi tien el Afriko, ridetas flate kaj kiaĥas tiel, kiel oni kiaĥas en sia patrolando: kiaĥ, kiaĥ, kiaĥ. Kaj n-ro 23, fleksebla kaj kuraga, kunpremas siajn nigrajn pugnoj.

La suno leviĝas pli alten. Ĝiaj radioj traboras la densan supraĵon de l' arboj, dissemas la mallumecon kaj rebrilas en la okuloj de la negroj. Iliaj kapoj kliniĝas flanken al la ombro, N-ro 23 ne palpebrume rigardas antaŭ sin. Liaj K-doj jam perdis la esperon pri sia liberigo. Unuj vivis nur por vivi; la estinteco estas forgesata,

---

estanteco tute ne ekzistas, l' estonteco ne estas konata. Aliaj fariĝis malkapabluloj, kiel bestoj, kaj perdis homan aspekton. Ĉe hundoj samtiel kiel ĉe homoj, estas instinktoj, kiuj forpelas la timon. Malsato — jen unu el tiaj instinktoj. La malsato devigis malgrandan, maldikan hundeton kapti oston kaj forkuri. La granda blanka hundo disŝiris ĝian gorgon.

La gardistoj ekkriis: "Vivu la blankuloj!" La gardistoj ridis, la negroj ankaŭ ridetis. Ĉiuj arestitoj deflankiĝis, sed n-o 23 levis bastonegon kaj krevigis la kapon al la blanka hundo.

Fariĝis granda bruo. "Jen la besto, jen la buĉisto, kiu mortbatis la hundon! Kanajlo!"

La ĉefo eliris sian tendon kaj, kiel ventego, alproksimiĝis al la loko de l' okazintaĵo. "Kio okazis, diablo?" li kriis. Li estas fortega, kun larĝa dorso, ruĝvizaĝa, flavhara, kaj rigardadis ĉiam per ŝtalaj okuloj. En unu mano li tenas revolveron kaj en la dua skurĝon. Oni raportis al li: "La altkreska negro, la ŝtelisto, n-ro 23, mortbatis la plej bonan hundon per bastonego."

"Negro?" respondis kolerege la ĉefo. "Negro, demetu cian veston!" Li celdirektis la revolveron. La nigro-blank-striaj vestoj terenfalis. Eksvingiĝis kaj komencis sian laboron la skurĝo.

"Negro, preĝu al dio!"

La batoj fariĝis malakraj. Ĉiuj silentis. "Hodiaŭ mi ne mortbatos cin, malbenita", diris la ĉefo; "al la laboro!"

Kaj al la gardistoj li ordonis: "Ili laboru sen ripozo, ĉar ni devas plimulti la produkton."

La sangkovrita homo klinis sin por levi siajn ĉifonojn. "Sago traboros cian ventron, se io kovras cian korpon."

La negroj eltiriĝis laŭlonge de la pinoj. Gutas valora suko, kiu nutras la civilizon per terebinto. Ili iras en la marĉon. Sub la piedoj svarmas insektoj kaj vermoj. Skorpioj sin kuŝas sub arbŝelaĵo. Senmove kuŝas aŭ malrapide rampas kaj levas la malgrandajn kapojn venenaj serpentoj. Pli danĝera ol ĉiuj aliaj estas la marĉomokasino. Ĝia mordo estas mortiga.

"Surlokiĝu, negroj" ordonas la ĉefo. Li scias la valoron de l' kantado; kiam oni kantas dum la laboro, la laboristoj fariĝas pli fortaj kaj forgesas pri sia malkontenteco. Negroj tre facile influigas per kantoj, eble ĉar ili vivas proksime al la naturo.

Voĉo neordinare malĝoja kantis pri marĉmokasino. El la malproksimaj anguloj de la pinarbaro, malĝoje eĥas rekantaĵo: "La marĉmokasino! La marĉmokasino!" Teruro pro la varmega, venenanta marĉo, malamo al la blankuloj, ofendo kaj doloro pro ilia senrifugeco enkorpiĝis en tiu rekantaĵo de l' malliberigitaj. La kantisto improvizis:

Marĉmokasino, kaŝu cin!  
Indulgú negrojn nun,  
Ne ŝirmos vojon ni al ci,  
Marĉmokasino, kaŝu cin!  
Marĉmokasino ne timas homon,  
Sub arb' falinta dormas ĝi,

Ĝi havas buŝon faden-blankan,  
Ĝi lekas lange nordon, sudon.  
La mokasin' ne timas homon,  
Okuloj ĝiaj terurigas,  
Cin gardu, negro; mokasin'  
Cin sendos al terura juĝo!

La nuda, nigra homo faletis, klinis sin, falis, leviĝis kaj ree faletis. La kapo doloris, la oreloj sonoris. La bruligita sango viziĝis al li afrikajn pragepatrojn, vagantajn tra la Kongodezertoj.

Tagmeze, la suno estas super la kapo. Varmege. La stomako estas malplena, la gorgo kaj la lipoj estas sekiĝintaj. Senfina ĉeno — laborado, manĝado, dormado, varmego kaj ree laborado, manĝado, dormado kaj varmego. Kial ne morti? Tiam estos nek kaĝo, nek laboro.

Faligitaj arboj putras en la marĉo kaj kovriĝas per fungoj. La suno forbruligis la maldikan ŝelon de la fungoj. Ili fariĝas brunaj, aŭ — ne brunaj, sed kupro-ruĝaj. Sed — ĉu ĝi estas fungoj? Kial ĝi moviĝas? Plektiĝas ringoj de la serpenta korpo. La marĉmokasino varmiĝas per la suno. La hundoj tuj rimarkis ĝin. Ili komencis boji kaj malantaŭenpaŝi.

La ĉefo ordonis por sia distro: “Negro, hundbuĉiŝto, kaptu la serpenton! Ĉu ci ne volas? Mi tuj tratruigos cian nigran haŭton!”  
Ekĝemo. Silentado.

“Ĉu ci aŭdas, negro?” Konvinke frapis la tenilo de la revolvero. Kaj subite ekbrilis la okuloj de la negro. Lia korpo tremis, kuntiriĝis, liaj movadoj fariĝis pli rapidaj kaj pripensitaj. Li ĵetis sin al la serpento pli rapide ol la lasta al li. Li premis, kiel per premilo, ĝian kolon kaj per la dua movo disŝiris ĝian abomenan korpon.

La negro ĉarmis momente la blankulojn kaj la negrojn, kiuj kun haltigita spirado sekvis lin.

Fulmorapidega movado — kaj la korpo de la pli ol metro-longa serpento brilis en la aero. La marĉmokasino, kiel ringo, ĉirkaŭis la kolon de la ĉefo kaj montris sian nigran ventron makule kolorigitan. Ĝia fadenblanka buŝo dufoje tuŝis la vizaĝon de la ĉefo.

Sago<sup>1</sup> trapafis la kapon de la negro. Li falis kaj la hundoj lekis lian sangon. La kapo de la ĉefo ruĝiĝis kaj fariĝis kvazaŭ grandega veziko. La okuloj kaj la nazo jam ne estis rekoneblaj. La gardistoj aŭdis lian agonian flustron: “Dio fariĝis negro. Li estas nigra . . . nigra . . . nigra . . .”

Tradukis M. Draznin (6772).

<sup>1</sup> Kredeble la tradukinto erare uzas “sago” anstataŭ kuglo. — Red.

---

---

# PRO AERO KAJ SUNO!

N. BARTHELMESS

Mi demandas vin, laboristaj gepatroj: Ĉu viaj infanoj ĝuas la brilan sunon kaj la freŝan aeron ekstere de la granda urbo kun ĝia malbonodora, eluzita aerhaladzo? Aŭ ĉu ili kiel multaj el siaj samaĝaj gefratoj nur sidas dum longaj horoj de la tago en malgranda kaĝo malantaŭ la fenestro fermita, pro ia kaŭzo retenataj en tiu karceri, dum ili kaŝe rigardas kun palaj vangoj kaj sopiraj rigardoj malsupren en la korton ĉirkaŭita runde de severa sesetaĝa dom-postfronto? Ĉar eble en tiu korto iu kamaradeto pli feliĉa ludas per globetoj, trafita kvazaŭ hazarde de luma radio, de supre falinta en la ŝakton tra tiu eta angulo da ĉiela bluaĵo.

Mi demandas vin, laboristaj gepatroj: Ĉu viaj infanoj estas inter tiuj, kiuj ĉiudimanĉe migras ekster la periferion de la sanmortiga urbego, kiuj dum sia somera libertempo komune pasigas serenajn semajnojn en arbaro kaj verdaĵo?

Se ne, — komparu la sanon de viaj infanoj kun la bonstato de tiuj knaboj, kiuj dediĉas sian dimanĉon al la vagado tra la belaĵoj de l'natur, tuj kiam la printempo avizas sian venon per la unuaj antaŭsignoj.

Aŭskultu la raporton de respondeca pioniro-knabo, kiu kun sia gvidanto kaj kelkaj elektitaj kamaradoj esploris la staton kaj kondiĉojn por somera tendaro. "Nia libertempejo estas en bona ordo, la litoj estas puraj kaj konvenaj, troviĝas akvo, manĝejo, herbejoj, ludplacoj, arbaro senfina, kaj la lago ne estas malproksima. Sed ni devas manĝi, ni devas vivi dum tiuj semajnoj, ni bezonas monerojn. Niaj gepatroj estas tro malriĉaj, por doni per siaj fortoj la bezonatan sumon. Ni devas aliri la publikon." Malmultajn koncizajn frazojn li parolas, sed ili entenas ĉion, eĉ la konkretajn proponojn por solvi la ekonomian demandon.

La kunveno de la infanoj akceptas la raporton, aprobas ĝin kaj ankaŭ la rimedojn por krei la finanĉan garantion, por sukcesigi la deziregatan libertempan tendaron. —

Estas sabato posttagmeze. La antaŭan vesperon la laboristoj portis hejmen siajn malgrasajn salajrojn, kaj ankoraŭ ne estas elspezita ĉio en tiu momento. La knaboj bone scias tion, kaj tial ili difinis la hodiaŭan tagon por la monkollektado favore al sia somera tendaro. La placo, sur kiu staras la "Cionpreĝejo" (en Berlina Nordo), estas ilia renkontejo. Tien ili are alvenas, vestitaj laŭ pionira ordo kaj kun la necesaj muzikiloj. Kontraŭ la preĝejo, kiel minaco, troviĝas la ruĝa agita kunvenejo de l' Ruĝfrontbatalantoj, kie ankaŭ la pioniroj kunvenas ĉiusemajne almenaŭ unu fojon.



---

“Ne stariĝu tiom kolektive antaŭ mia sojlo“, vokas la mastrino, seriozmiene, sed ne kolereme (kiel bone scias la knaboj). Ŝi estas fiera pro tio, ke ĝi disponigas sian ejon depost 40 jaroj al la ruĝuloj, kaj ŝi ne malŝatas la plej junan generacion de klasbatalantoj, la pionirojn; nur en tiu ĉi momentó ŝi malbenas ilin, kiam la laŭtaj, kriemaj buboj en siaj pionir-uniformoj pli ekscititaj eĉ ol ordinare, babilaĉas kaj disputaŝ antaŭ la pordo kaj malebligas trapasi la trotuaron en tiu loko.

Sed nun ili svarmas kiel abeloj forlasantaj la korbon, kaj ĵetas sin torente al la alia flanko de la strato, ne atentante pri aŭtoj kaj veturiloj, kaj stariĝas laŭorde en vicoj. — Ne ĉiuj ĉeestas, kiujn vokis la ordono. Unu knabo devas disporti gazetojn dum tiu ĉi horo, unu devas gardi sian dujaran frateton, unu devas veturigi karbojn por la patrino, unu ĵus estas por esploro ĉe kuracisto pro nervmalsana atako, kaj unu eĉ ĉiutage ĝis malfrua vespera horo devas fari komisionojn kiel kurknabo ĉe vendejo. Sed multaj ĉeestantoj garantias sukceson de l' agado, ne nur la grandaj, ankaŭ la tre malgrandaj buboj, kaj tiu krurmalsanulo kun la ligna tibio, kiu suferas pro rakita malsano de siaj unuaj vivjaroj, kaj kiu ne povas suprensalti kiel la aliaj la ŝtuparojn de ses etaĝoj kaj neniam povas partopreni la belajn ekskursojn.

Kaj kiam la trumpeto gaje sonas tra la stratoj, kaj la policisto (Sipo) ĉe la angulo mirigite kaj iom ĉagrene flankrigardas al la brua spektaklo, multaj kapoj aperas en la fenestroj, kaj amaso da infanoj de ĉiuj anguloj alkuras, logitaj de la metala voĉo, kaj observas kun scivolemo kaj envio la ekmarŝantojn.

Tiu pala knabo, kiu staras apogita al la balustrado en la unua domo, kiu estas alpropagandota, esprimas per la brilo de siaj okuloj ardan sopiron.

“Ĉu vi ne volas nin aliĝi“, demandas lin unu el la vigluloj, kiuj suprensaltas la ŝtuparon ĝis la subtegmentejo, por — se ili havas bonŝancon — akiri moneron.

“Mi arde dezirus, jam delonge,“ respondas kun singultanta voĉo la eta palulo, “sed miaj gepatroj absolute ne permesas al mi, eniri vian taĉmenton.“

La pioniro kapskuas, pensante pri la malsaĝeco de plenaĝaj homoj.

Dume la knaboj, kiuj estis ekipitaj per tamburoj kaj trumpetoj, prenis pozicion sur la larĝa korto kaj suprensendis ribelan muzikon forte akcentitan al la fenestroj de l' domaro, kiu kvadrante ĉirkaŭas la sufiĉe vastan korton. Multaj aŭskultemuloj, sed precipe la infanoj — ĝis plej malsupra limo de aĝo, nome tiuj, kiuj faras la unuajn memstarajn paŝetojn — kunpremiĝas ĉirkaŭ la muzikantoj, kaj ĉiam novaj alŝoviĝas tra la mallarĝa dompordo, ĝis la korto

---

fine estas tute nigra pro hometoj. Post la muzikludo unu parolkapabla pioniro faras paroladeton, atentigante, ke ili, la junaj pioniroj, intencas starigi someran tendaron kaj pro tio petas la proletojn, doni al ili monerojn, por ebligi la realigon de l' projekto.

Samtempe jam suprenkuras la ŝtuparojn kelkaj kolektantoj kun listoj laŭordè stampitaj de l' Centra Komitato kaj specialaj "libertempaj markoj". Kun plej ĝentilaj vortoj la pioniroj prezentas sian peton.

Kia diferenca trakto al ili en la diversaj loĝejoj!

"Ni ne havas eĉ unu moneron por vi, bubaĉoj; ni estas honestaj burĝoj!" indignas iuj. "Bedaŭrinde pro nia senlaboreco nur tiom malmulte ni povas doni al vi", diras aliaj, kiuj donacas spite sia propra mizero. "La plej malriĉaj donas plej volonte", konstatas la knaboj. Multaj tute ignoras, ne malfermas eĉ fendon de la pordo, insultas. La muziko ĉesis, la fluo da infanoj, akompanantaj la pionirojn, verŝas sin el pordego en la apudan domon, la apudan korton, kiu tute egalas la unuan. Rapide revenas de la ŝtuparoj la kolektantoj, por ne perdi la kontakton kun la k-doĵ kaj ripeti la saman en la alia domo.

Horoj jam pasis, kaj ne montras signojn de laciĝo la knaboj. Neniu pensas pri reiro hejmen. "Ankoraŭ estas tempo", ili argumentas. "Ni devas ĝin eluzi, ne sufiĉas nia ĝisnuna akiro!"

"Venu en tiun ĉi domon," proponas unu etulo apenaŭ videbla pro sia malgrandeco, "tie vi certe ricevos multon, ĉar tie loĝas multaj ruĝuloj." Sed oni ne priatentas lin, ĉar oni sisteme kaj laŭvice prilaboras ĉiun domon.

Fine oni decidas reiri, al la "Cionpreĝejo" placo, kie en la kunvenejo oni kontrolas la rezulton de l' kolekto. Kvankam ne super-ega, tamen kontentiga ĝi montriĝas, kaj la knaboj kun gajaj mienoj, malgraŭ la laciĝo en la kruroj, ankoraŭ babilas laŭ sia infana maniero, antaŭ ol ili disiĝas por la noktripozo. —

Alian tagon apud iu dompordo, flanke de spicista vendejo, Friĉjo trovis sian amikon, la pioniron Robert, kun fleksitaj genuoj super kreta desegnaĵo, kiun li estis farinta sur la asfalta pavimo. Li estis tiom enpenŝiginta, kaj faris kun tia streĉita atento iun observon aŭ kalkulon, ke Friĉjon li tute ne rimarkis, kvankam tiu staris dense apud li. La buklo de lia hararo estis falinta sur la vizaĝon kaj kovris ties duonon, kaj unu brako kondukis la kretan laŭlonge la desegnitaj linioj.

Friĉjo ridetis. "Li fartas kiel mi," li pensis, "li revas pri la somera tendaro kaj jam havas siajn planojn, kiel mi!"

Tiam li genufleksigis apud Robert, tiel ke li sidis kun li en sama alteco, vizaĝo ĉe vizaĝo, kaj malforte frapis per la manplato sur la streĉitan femuron de l' knabo, kiu elstaris nuda super la

---

genuo. Robert estis konsternita momenton, sed ekvidante la rid-  
antajn okulojn de l' amiko, li ridetis feliĉe.

“Jen, kiajn sensencaĵojn vi faras, Robert“, eligis kun sia kutima  
ŝercemo Friĉjo.

“La tendaro, la tendaro — — Mi devas ĉiam pensi pri ĝi“,  
sopiris Robert.

“Vidu, estas tute la sama afero ĉe mi“, konfesis Friĉjo. “Estas,  
kvazaŭ ni preparus jam por la morgaŭa tago la alveturon en  
arbaron, por ĝui la belan tempon.“

Kaj ĝi aperis al ili tiom pli bela, ke ili mem estis klopodantaj  
ĝis lacegiĝo, por akiri la rimedojn por elvojaĝi. Longe ili tiel sidis  
kune, ĝis la turhorloĝo anoncis la sepan horon kaj la oblikvaj  
radioj de la suno avertis pri ĝia subiro. Tiam ili rapide ekstaris,  
kaj ili interŝanĝis firme kaj helvoĉe sian adiaŭan parolon:

“Estu preta!“ — “Ĉiam preta!“



## KUNULINO

K. JOHANSSON

*Kunulino mia, kara knabinet',  
Kial vi malĝojas, kial ne ridet' ?  
Trompa estas mondo, tion sciu vi,  
Sed ne malesperu: via estu mi!*

*Bona karulino, ĉarma belulin',  
Volus mi tutkore arde ami vin,  
Pro beleco via, kiu estas ag'  
De la di' Amoro per la trafa sag'.*

*Se vi donus al mi manon vian nun,  
Ĝoje ni kunvivus, brilus klara sun'  
De la bela amo, batus same du  
Koroj en kontakto, ne malĝojo plu.*

*La respondo via estu nia sort':  
Senŝavora — eble estus mia mort',  
Sed mi jam esperas, ke pro mia pet'  
Ĉesos la malĝojo tuj en belridet'.*



---

---

# ENIRKARTO POR LA ĈIELLANDO

ALEKSANDRO BARTA

Vivis foje sur nelogata grundo, en kaduka bretbudo, panjo ŝajnanta treege maljuna. Sed tiu ĉi panjo, kiu ŝajnis treege maljuna, efektive tute ne estis tiom maljuna; ŝi nur trompis la mondon. Entute ŝi estis kvardekjara, siajn senhariĝantan, griziĝantan kapon kaj maldikegajn brakojn ŝi portis sur sia trunko nur por erarigi la homojn.

Kaj ĉi tiu stranga maljunulino havis virgan, junan filinon. Panjo kaj filino de tagiĝo ĝis malfrua krepusko vagadis de strato al strato portante sakojn sur siaj dorsoj kaj serĉfosadis en la malbonodora enhavo de sitejoj kaj malpuraĵkestoj. Kaj se iliaj konvulsie skrapantaj fingroj trovis ian duone forbrulintan karbopecon, avide ili ĵetis ĝin en la faŭkon de la profunda sako, kaj se iun duone konsumitan manĝrestaĵon ekhavis iliaj manoj, tion fratece ili dividis. Kaj ĉar tiajn ili plej ofte trovis en la vila-kvartaloj, ili kutimis jam frumatene tien iri.

Okazis foje antaŭ balustrado de granda placo, ke en la blanke pentrita malpuraĵkesto inter sardinaj skatoloj, inter duone formanĝitaj buterbulkoj ia stranga, ruĝa paperpeceto kuris en la manon de la knabino. Gaje ridis la ardokuloj knabinaj.

Ĉar kion vi ja opinias, kio estis tiu ruĝkolora paperpeceto, kiun ĉi tiu knabino ĉifone vestita tiel feliĉe premis al sia brusto?

Loĝibileto! Loĝibileto valida por la hodiaŭa opera prezentado! La opero! La opero tegita per purpura pluŝo! La opero plena de marmoro ŝaumblanka! Kie orkestro tricentmembra ploregis muzikon por la dancado de plej belkruraj virinoj kaj kie paŝi sur la pargeton estis permesata por viroj nur en frako kaj por virinoj nur en bala kostumo dekoltita ĝis la umbiliko.

Kaj ambaŭ simplaj estaĵoj kvazaŭ du senkoloraj papilioj sopiris la superlativon de siaj songoj.

Apenaŭ la fabriksirenoj avizis la tagmezon, ili jam estis hejme en sia eta budaĉo kaj delikate lavis unu la alian, kaj la neparajn orelingojn kolektitajn en la malpuraĵoj ili pendigis en la orelojn. Ili elserĉis siajn plej belajn ĉifonojn kaj ornamis siajn vizaĝojn.

Ja, kiel pizo ĵus eligita el ŝelo kota-tera, tiel freŝe aperis la knabino demetinte la ŝelon de malpureco kaj malriĉeco.

Poste, mano en mano, ili ekiris la neniam viditajn vojojn de la kolosa urbo, al la sepkupola opero ĉirkaŭita de parkoj kaj policistkordonoj.

Kiam ili alvenis feliĉe la limon de la urba centro, kaj la lakitaj aŭtomobiloj kurantaj sur malaltaj gumradoj ĉiam pli kaj pli multiĝis ĉirkaŭ ili, subite — kvazaŭ ili estus sur malpermesita teritorio — timego ekkaptis ilian koron.

La policista kordono plidensiĝis, kaj ĉe la stratkruciĝoj staris policistoj kun blankaj gantoj, kiuj per sola mansvingo haltigis eĉ la plej rapidegajn aŭtomobilriverojn.

Kaj jen, kiam ilin jam nur kelkaj paŝoj disigis de la superlativo de sopiroj:

---

de la sepkupola opero, la blankganta policisto subite minace altenlevis sian manon kaj la movmaro, kvazaŭ du bordoj, interrompiĝis.

Ho, sed ili ruze kaŝis sin malantaŭ reklam-lumkolono kaj atendis, ĝis la blankganta monstro turnis sian dorson al ili.

Poste, kvazaŭ lacertoj, ili ŝtelrapidis la transan flankon.

Ĝi jam estis plena de elegantaj sinjoroj kaj sinjorinoj promenantaj tien kaj reen, kaj la sinjoroj kamomilojn kaj la sinjorinoj parfumajn skatolojn svingadis senzorge en la manoj.

Sed ili kvazaŭ amuleton premadis en la mano la loĝibileton kaj preskaŭ samtempe enpaŝis tra la pordo, antaŭ kiu staris homo havanta arĝentan bastonon, orajn butonojn, ardeplumon.

Sed ĉi tiu homo — al kiu, vidanta la frakajn sinjorojn kaj la sinjorinojn en balaj kostumoj, eĉ ne estis permesata eksteri, per la barbo ĉar aliel tuj li estus maldungita — nun ĵetis sian orbutonan bastonon antaŭ la du simplajn animojn.

Sed ili montris la sakramenton, la pasporton por la ĉiellando. Kaj nun la homo kunfrapis siajn kalkanumojn kaj altenlevis sian bastonon antaŭ si.

La du simplaj animoj enpaŝis la landon de brilo.

Ĝi estis cirkloforma, blanka marmorkoridoro kun centbrakaj lustroj or-verŝantaj, sub kiuj en ruĝ-flav-blauaj kaĝoj kolibrooj kantadis. Kaj en la kavaĵoj ametistverdaj floroj etendis supren siajn glaciajn korpojn balanc-iĝantajn kaj en ili, kvazaŭ etaj rubenoj, briladis la lampetoj. Kaj krome, estis ankoraŭ tie ankaŭ dekkvar pordetoj kaj antaŭ ili dekkvar etaj negridoj purpure vestitaj.

Ambaŭ simplaj animoj premis la manon al la koro, kiu ĉvelis, ondadis kvazaŭ granda infanokulo. Sed ĉar malantaŭ ili kelkloke oni jam interflustradis, ili paŝis al unu el la purpuraj negridoj kaj montris al li la loĝibileton. Kaj li digne sidigis ilin en larĝan velurvarman kabineton, en kiu estis du ore kadritaj veneziaj speguloj kaj super ili: okpieda oraraneo, kun ardantaj perloj en la buŝo. Mano en mano, timante kvazaŭ bestoj tremantaj pro lumo, ili retiriĝis en la angulon.

Sed en ĉi tiu momento ekbrulis la lustroj similaj al birdosvarmoj kaj malsupre, en la plej profunda profundo la violonoj komencis tinti.

La fandiĝintaj or-konvolvuloj de la lustroj rebrilis sur la malmoligitaj ĉemizoj. El la kontraŭflanka loĝiario elrondiĝis blanke pudritaj ŝultroj. Bongustaj abrikotoj kvazaŭ fajreris en la flegitaj manoj.

Sed ili, kvazaŭ duonsvenaj lumpapilioj, ne povis rekonsciigi. Ili spiregis, sopiris freŝan, vizaĝpinĉantan venton, — nur solan, konatan punkton, je kiu ili povus sin apogi.

Nur kaŝe, ŝtele, premante la manojn unu al la alia, ili kuraĝis veni ĝis la ruĝpluŝa barilo.

Malsupre la orkestro jam sin preparante veadis, kaj super la blua, silka kurteno ekleviĝis digne la peza, fera rulkurteno.

Tiam, kvazaŭ sorĉitaj, fine ili iris al la barilo, kaj kun malfermitaj buŝoj ili streĉrigardis la konstante konsumiĝantan ferkurtenon.

La plej rimarkebla, plej bela loĝio estis ilia. Kaj nun subite ili ekvidis, kiel palkoloraj fariĝis iliaj, surkorpaj ĉifonoj en la blindiga lumo kaj kiel direktiĝas kontraŭ ili la lornoj kvazaŭ pafiloj pretaj por pafi.

Kaj vere, nun subite tricent lornoj direktis sin kontraŭ ili de la partero kaj el la krono de loĝioj. Kaj tiuj multaj brulumantaj okuloj ĉiuj vagadis sur iliaj korpoj, ĉiuj rigardis iliajn neparajn orelingojn kaj senkolorajn vestaĵojn.

Kaj nun subite la sango kolektiĝis sur iliaj vizaĝoj, kaj ili sentis, ke la okuloj, kvazaŭ fajraj fokuso ekbruligas iliajn korpojn. Kaj kelkloke rimarkoj estis aŭdeblaj. Kelkiuj laŭte ekridis, aliaj siblis ion tra la dentoj, iu akre sibladis, kaj la konstante kreskanta maltrankvilo fariĝis simila al mallaŭtigita murmurado de hundoj.

Kaj nun ankaŭ la orkestro komencis nerve tintadi, kaj la arĉoj eniĝis en la aeron kvazaŭ mastoj de kadukaj velŝipoj. Malantaŭ la kurteno, kvazaŭ rasĉevaloj antaŭ konkurso, dancistinoj tremetis pro la ekscito. La ĉiam pli kaj pli grandiganta ekscito vibradis en la grandega konstruaĵo.

Sed ili nur sidis rigide en la ruĝa pluŝcambreto kaj spasme premadis la manojn unu de la alia en la timiga murmurado.

Kelkiuj jam danĝere klinis sin tra la pluŝbarilo kaj tiel rigardaĉis ilin. Poste aŭdiĝis piedfrapado. Kaj la murmurado kreskis konstante, dronis en la siblado kaj denove supreniĝis.

Nun en la partero iu el la frakuloj — konsternige! — saltis sur seĝon! La seĝo brue rompiĝis sub li. Pro la bruo ĉiuj saltleviĝis. Virino ekkriis. Pro tio histeriulino en iu partera loĝio svenis. La ĉambristino kripetis akvon. Je kio sur la galerio oni kredis, ke la domo brulas kaj iu ekhurlis:

— Fajro!!!

Centope oni kriegis kun centspeca teruro:

— Al la sekurelirejo!! Fajro!! Rifuĝi!!

Kvazaŭ elektra ondoj kuregis tra la nervoj la vortoj, supren, en la ekbrulintajn kapojn, kaj kurbiĝintaj je sangaj vekrioj ili eliĝis el la buŝoj:

— Fajro!! Helpon!!!

Kaj en la sekvanta momento la homoj premegis unu la alian antaŭ la mallarĝaj elirejoj. La virinoj vekriadis por helpo kaj ŝiradis siajn harojn.

Kaj kiam policista oficiro, kiu volis fari silenton, por ke li povu per kelkaj vortoj trankviligi la publikon, pafis en la aeron — el la orkestro iu ekkriis:

— Eksplodis...

La vortoj pereis en la ekmuĝanta voĉuragano.

La ferkurteno per kapturna rapideco malsuprenfalegis.

La muzikistoj per la karaj muzikiloj tranĉis vojon por si en la amaso de lakŝuaj kaj frakaj sinjoroj piedpremantaj la kalojn unu al la alia kaj troviĝis iuj, kiuj luktadis kun la virinoj, kaj dume neniu povis eliĝi tra la pordoj, kaj la amaso kvazaŭ ciklono premiĝinta en malvastan strateton, cirkuladis antaŭ la elirejoj kaj premis sin je nereconebla karnoruino.

La fajrobrigadistoj enkurintaj kun hakpioĉoj enigis en la amason la akvo-radiojn. Sovaĝa ekkrio tremigis tiam la konstruaĵon, kaj la amaso ektimante, kun ŝvelintaj okuloj refluis de la elirejoj, kredante, ke ankaŭ la koridoroj jam brulas.

Iu furiozante grimpis sur la plej altan lustron kaj tie balancis sin gorile, kriante:

— Hura! Brulas lango de la akva bovido!

Nun jam dekope grimpis la homoj kvazaŭ vivantaj konvolvuloj sur la

kolonojn, lampojn kaj murojn, plej antaŭe la policista oficiro, kiu nun jam ankaŭ mem kredis, ke la fajro nesaveble ĉirkaŭbaris ilin.

Sen en ĉi tiu momento la hirta, duone nuda viro balanciĝanta sur la lustro kun akrega ekkrio kapen terenfalegis sur la ŝtonkubojn, kuntirante la lustron, kiu dum unu momento kvazaŭ falombrelo lumigita malsuprenfalis en kruela gipsa stukajpluvego.

Kaj nun jam sangriveretoj fluadis, kaj la frakuloj kvazaŭ ĉevaloj ekglitintaj en glacia neĝo, kureĝadis panike en la sanglaĝetoj. Ili sangumis la brustojn unu al la alia, deŝiradis la spegulglatajn frakalojn unu al la alia.

Ekstere, sur la stratoj, dume la policistaro kordonis la tutan distrikton, ĉar cirkulis la famo, ke revoluciuloj eksplodigis la operdomon.

La armeestraro sendis taĉmentojn kun maŝinpafiloj al la stratkruciĝoj, post kio la tuta periferio ekiris al la urba centro.

Tiam krozantaj biciklaj kaj nebiciklaj spionoj anoncis al la policestraro, ke laboristoj proksimiĝas al la centro. La diviziestraro sciigis al la ministraro, ke la ribeluloj direktas sin al la internaj distriktoj. La ministraro dekretis militjuron. Inter la spicistoj kaj maljunaj virinaĉoj famis, ke la imperiestro revenis en la landon. Pro ĝojo ili tuj duobligis la prezojn. Pro tio en la periferio oni linĉis du domposedantojn kaj tri bakistojn. Sekve de tio la kirasautomobiloj komencis maŝinpafadi la rigardantan amason, kaj dek ses etaj infanoj, kvardektri virinoj kaj naŭ viroj restis sur la sanga pavimo.

En la fabrikaj kvartaloj la famo disvastiĝis kvazaŭ fajro. Vespere je la deka ĉio ĉesis funkcii. Ankaŭ la elektrocentralo.

Blinda mallumo kovris la urbon, la lastajn, luktantajn en la granda operdomo frakulojn, disŝiritajn je karnoĉifonaĵoj, kaj la montetojn el kadavroj nun jam ne luktantaj.

Tiam la du simplaj estaĵoj, kiuj rigide sidis ankoraŭ en la kabineto, premante la manojn unu de la alia kaj la loĝibileton, malantaŭ la pluŝbarilo, deviŝis la ŝviton sur siaj fruntoj, kaj ĉar ili pensis, ke la prezentado finiĝis, ili aplaudis la rolintojn kaj tra la malplena, nigra koridoro kaj malhelegaj stratoj silente hejmeniris.

Ili hejmeniris kaj endormiĝis kun granda seniluziigo kaj decidis, ke neniam plu ili vizitos la operdomon.

Kaj super la du simplaj animoj kaj la tuta urbo, kvazaŭ kolosa verda kajto<sup>1</sup> ŝvebis velo en ventoj! la luno.

Trad. H e r w e g.

<sup>1</sup> Bedaŭrinde ni ne ricevis klarigon pri tiu vorto. — R e d.



# ARTO KAJ SOCIALISMO

D. GLIZER

La esprim-formoj de arto estas vorto, sono kaj bildo. Mi ĉi tie pritraktos la vorton kaj precipe literaturon kaj teatron.

En la eksterlanda kaj en la ĉi tiea literatura ĵurnalaro estas nun multe da loko dediĉata al la arto. Burgaj pseŭdo-kritikistoj parolas pri "arto por arto" kiel pri la plej perfekta kaj "pura" arto. Oni ankaŭ provis paroli pri novaj vojoj de "senpartia" teatro ktp. Ĉu vere ekzistis kaj ekzistas tiela "pura" "arto por arto"? Mi respondas per kategoria "Ne"! Tiela arto neniam ĝis hodiaŭa tago ekzistis. Ĉar arto estas artece esprimitaj subjektivaj ideoj. Artece esprimi estas: "esprimi sentojn, psikologiajn travivaĵojn, kiuj kapablas elvoki ĉe l'alia la samajn sentojn kaj travivaĵojn" (impresi).

La artec-esprimilo, la formo, dependas de la intuicio de l'artisto, tiel ke ĉiu artisto devas ĝin posedi. Sed la enhavo, la ideoj dependas de l'intelektulo de la artisto tiel, ke ili povas esti profundaj aŭ malprofundaj. Ambaŭ, la enhavo kaj la formo, dependas de la tempo. Kiam la formo ekzemple perdas dumtempe sian artecan valoron, tiam restas la enhavo. Kiam la enhavo perdas la valoron (dum realigo, aŭ banaliĝo de ideo), restas la arteca formo. Sed kiam ambaŭ, la enhavo kaj la formo, perdas siajn valorojn, tiam la verko iĝas forviŝita kaj la aŭtoro forgesita.

La grandeco de Ŝekspir, Gete, Bajron, Servantes k. a. konsistas ne nur en la transdonmaniero de ilia pensado, sed precipe en la pensado mem, en la grandaj ideoj kaj vojlinioj, kiujn ili eligis. Kun Servantes okazus la samo, kio okazis kun la aliaj liatempaj kavalir-verkistoj, sed Don-Kihoto transformiĝas, malgraŭ la intenco de l'aŭtoro, doni kavaliran idioton — en idealiston, kaj kvankam la verko ne havas artecan formon, tamen ĝi ekzistas tiel longe, kiel longe idealismo ekzistos. Sed male, la valoro de la "Iliado" de Homero ne konsistas en la enhavo, sed en la formo, kiu restos klasika modelo de arteco dum multaj jaroj.

Kiel evidente, ĉiu artverko devas enhavi ne nur formon, sed ankaŭ enhavon, ideon — la rezulton de l'artista pensado. Ĉar ĉiu artisto estas samtempe pensulo, kiu havas sian kredon, sian religion. Ĉu la religio konsistas el malnovaj ideoj, kunigitaj kun la nuntempa pensado de la artisto kaj refreŝigitaj en propra specife originala stilo; ĉu la religio konsistas el tute novaj ideoj en nova stilo, aŭ el aktualaj ideoj, kiuj estas sur la sojlo de realigo — tio ne estas grava. Estas nur grave, ke ĉiu granda artisto devas posedi religion. (Pri la tielnomataj "artistoj", kiuj kreskas kiel ŝvelaĵoj post mordetoj de kuloj, ne estas ĉi tie parolate).

Pri kia religio estas ĉi tie parolate? La hodiaŭa socio estas dividita je du klasoj: burĝa kaj proleta, kiuj havas malsamajn interesojn, vivas en malsamaj ekonomiaj cirkonstancoj, kiuj kompreneble jam efikas je la spirito. Inter ĉi tiuj du klasoj okazas batalo pro la hegemonio. La religio<sup>1</sup> de la

---

<sup>1</sup> Se la socialismo — aŭ komunismo — estas religio, estas memkompreneble, ke ĝi devas havi pastrojn, por instrui la novan kredon. Eble maliculo povus aserti, ke jam kreiĝas ĉi tiu nova klaso da parazitaj. E. L.



---

laborista klaso estas la socialismo — la plej granda religio de la deknaŭa kaj dudeka jarcentoj. Nun ĉe la sojlo de la dudeka jarcento, kiam la socialismo realiĝas, estas la batalo plej akra. Neniu flanke staras, despli, pensulo kaj ide-kreanto. Ĉar, kiaj estas la celoj de arto, se ne plibeligi nian vivon kaj pliriĉigi kaj evoluigi nian intelekton? Kaj kiamaniere oni plibeligus la vivon de la laborista klaso, se ne plibonigante ĝiajn ekonomiajn cirkonstancojn, de kiuj dependas la evoluo kaj pliriĉigo de la laborista spirito?

Oni ne timu, ke la arto transformiĝos en nuran propagandon, en senartecajn, nudajn ideojn. Male, se nur la artisto estas vera artisto-psikologo, riĉa je simboloj, bildoj kaj komparoj, tiam la arto ĉe li neniel suferus. Ĉu suferas la arto de M. Gorkij, Rolland<sup>1</sup>, Barbŭs, Toller kaj aliaj mondartistoj pro tio, ke ili estas (en siaj verkoj) ĉe la flanko de la laborista klaso?

Ĉar estas malĝuste opinii, ke la intuicio de la artisto estas la freneza sento, kiu lin ĉirkaŭas en kelkaj horoj, kaj sub la influo de ĉi tiu frenezeco li komencas senkonscie “produkti”. Vere, la intuicio de la artisto ludas gravan rolon en lia kreado, sed lia intelekto estas samtempe bona kontrolisto.

Psikologie la artisto havas tri kre-vojojn: tempan (unu post la alia, li kreas unu bildon kaj poste la alian; kune estas maleble); spacan (unu apud la alia, li havas la ĝeneralan aspekton de ĉiuj bildoj); kaj temp-spacan (li havas por si klare la tutan verkon kaj ĉiun bildon aparte).

La unua vojo estas mallarĝa. La artisto ne havas la perspektivon kaj povas tiamaniere devojiĝi. Tio estas vojo, kie la kreanto povas fariĝi “materialo en mano de materialo” (la materialo povas lin regi). Kvankam la dua vojo estas vasta, tamen estas malfacile ĝin imagi sen interrilato kun la unua vojo (eĉ koncerne bildon). La tria vojo estas la plej larĝa. La materialo jam ne povas fariĝi kreanto je la artisto. Dum la artisto de la unua krevojo “ne ekvidas pro la arboj la arbaron”, la artisto de la tria vojo ekvidas la arbaron kaj la arbojn. Tiu ĉi kre-vojo bazas sur la sento kaj intelekto. La fruktoj de tiu ĉi vojo povas atingi la gradon de plena perfekta arto. (Kompreneble la grado dependas de l’ intelekto kaj intuicio de l’ artisto.)

Elirante de tiu ĉi vidpunkto ni vidas, ke “arto por arto” povas ekzisti, sed ne vualite kiel ĉe la burĝaj pseŭdo-kritikistoj. Ĝi ne estas tiel objektiva, kiel ili ĝin pritraktas. Mi eĉ vidis en iu gazeto, ke ankaŭ la romantismon oni alskribas al la “arto por arto”. Pri tio ĝenerale ne indas paroli, tio estas simpla profaneco de ĉiu ajn vidpunkto. Pri la malutilo de romantismo<sup>2</sup> (de Perek<sup>3</sup> tiel bone kiel de Mickievic<sup>4</sup>, Einhorn<sup>3</sup> k. a.) por la laborista klaso oni jam sufiĉe skribis. Estas al ĉiu klare, ke la romantismo fortiras de la reala vivo, de la estanteco, kaj tio estas malutila, ĉar la laborista klaso povas atingi pli bonan estontecon pere de la estanteco. Ĝenerale, kiel jam dirite, arto respondas je la demando ne nur kiel? sed ankaŭ kion? Antaŭ ĉio la ideo, poste la arteco de la verko.

Tiel ekzemple “Pan Tadeusz” (Sinjoro Tadeo) de Mickievic ne estas arto, sed arteca verko (el nia vidpunkto), ĉar kio estas tie la ĉefideo? Putrinteco de la pola “ŝlahto” (nobelaro), kunplektite kun la patriotismo de

---

<sup>1</sup> La aŭtoro ŝajne ne sufiĉe konas la vidpunkton de Rolland. E. L.

<sup>2</sup> Aparte pri romantismo kaj art-direktoj, kiuj rilatas la artecon kiel Ekspresionismo, Impresionismo, Imaginismo k. a. mi aparte skribos.

<sup>3</sup> Konata juda verkisto.

<sup>4</sup> La “plej granda” pola verkisto.

---

Jacek Soplca (la ĉefheroo de la verko). Sed la formo: la strukturo de la verko, ĉiu naturbildo aparte estas vere artecaj.

La ŝamo rilatas la teatron. Ne sufiĉas, ke la artisto havu nur talenton; li krome devas havi spiritan prepariĝon al la rolo, li devas havi kun la rolo ion komunan, ĝi (la rolo) devas esti parto de lia "mi", kaj tiam li donas la perfektan arton. Sed kiam la "eminenta artisto" pasigos la tutan tagon ie en gajaj kaj malspritaj societoj en kafejoj, kaj vespere li prenos sur sin ludi la rolon de serioza homo, tiam la ludado estos ĉe li mekanika, li mem estos morale kaj fizike ligita kaj en tia stato li anstataŭ arton donas artimiton.

La konata rusa reĝisoro kaj gvidanto de la Moskva art-teatro Stanislavski, post la kontrolo de la kaŭzoj de lia artista defalo i. a. skribis: "Mia animo, mia korpo — en la roloj kripliĝis de tago al tago, de prezentado al prezentado, dank' al la malbonaj teatraj alkutimiĝoj, aktoraj artifaĵoj, la adaptiĝo al la publiko, la malvera aliro al la kreado."

"Kiam mi klare eksentis la malutilojn de la aktora stato — mi nature ekkomencis serĉi alian moralan kaj fizikan staton de aktoro sur la scenejo. Male, al la aktora stato, ni nomu ĝin krea stato. Mi tiam komprenis, ke granduloj preskaŭ ĉiam troviĝas sur la scenejo en krea stato, kaj aldone, en la plej alta grado de perfekteco."

Do, kiam la rolo estos parto de la artisto "mi", kiam la ludado estos parto de lia vivo, li tiam troviĝos, kiel Stanislavski diras, en "krea stato". Dum la "artista" de l' "aktora stato" estas ligita dum la ludado, li ektimas pro la publiko (lia tuta esteco ja estas koncentrigita en la rolo. La vortoj, la gestoj estas mekanike ellernitaj!) ktp., la artisto de l' "krea stato" povas atingi la plej altan gradon de perfekteco."

Sur tiuj ĉi artvojoj iras la Moskva juda kamer-teatro, la konata germana reĝisoro E. Piskator k. a. Kelkaj artistoj de la kamer-teatro troviĝas dum la ludado en "krea stato". "En ĉiu prezentado — diras la artisto de la Moskva juda kamer-teatro B. Zuskin — kiun ni prezentis, ni havis ĉefideon. En "Nokte sur la malnova bazaro"<sup>1</sup> ni starigis mortmemorindaĵon, la malnovan judan vivon, per "La vojaĝoj de Benjamino la tria"<sup>2</sup> ni forĵetis la malriĉecon kaj per "Menahem-Mendel"<sup>3</sup> ni enfosis la Donkihotecon — kaj samtempe ni montris klare la malnovan vivmanieron, la burĝan mondon en tre negativaj formoj. La pozitiva el la juda vivo venos ankoraŭ, laŭ nia enrigardo en niaj pliaj prezentoj."

Kaj vere, dank' al tio, ke ĉiuj artistoj havas konscian aliron al la rolo, dank' al tio, ke "ili bone pripensas la reciprokajn rilatojn de ĉiuj elementoj kaj subjetas ilin al la ĉefideo, kiu estas ilia sola tasko kaj sola celo", dank' al tio la kamer-teatro staras je la ĝusta art-alteco. La kamer-teatro ludas, kiel Zuskin diras, negativaĵojn, la pozitivaj ankoraŭ venos. Sed E. Piskator ludas jam rekte pozitivajojn el la hodiaŭa vivo (Toller). Tio estas tre grava. Ĉar kio estas dramo? Agado, vivo. La hodiaŭa vivo estas batalo inter la burĝa kaj proleta klasoj.

La religio de l'artista, kiu estas flanke de la laborista klaso, estas la Socialismo. Tio signifas, ke ankaŭ la spirita prepariĝo al la rolo — kiu estas parto de lia vivo — estas kompreneble en plena konsento kun lia religio.

---

<sup>1</sup> Unu el la plej bonaj verkoj de Perek.

<sup>2</sup> La plej bona verko de Mendele Moĵher-Sforim — la avo de la juda literaturo.

<sup>3</sup> Unu el la plej bonaj verkoj de Solom-Aleĵhem, klasika juda verkisto.

---

# HISTORIO DE LA MONDOLINGVO

## (TRI JARCENTOJ DA SERĈADO)

ERNESTO DREZEN

El la rusa lingvo tradukis N. HOHLOV. Ĝenerale redaktis N. NEKRASOV

*La unika verko pri historio de la mondolingvo "Za Vseobŝĉim Jazykom" de E. Drezen, plej komplete entenanta informojn pri senescepte ĉiuj konataj projektoj de lingvo internacia kaj eldonita en la rusa lingvo de Ĉefa Scienca Administrejo de RSFSR "Glavnanka", nun estas esperantigata kaj jen aperados en ĉiu n-o de "La Nova Epoko" en formo multe prilaborita kaj kompletigita per novaj faktoj. Tiamaniere en la fino de la jaro formiĝos en eldono de SAT kapitala volumo sub titolo "Historio de la Mondolingvo", kies scienca valoro kaj signifo por la tuta movado esperantista estas jam nun tute eksterduba.*

RED.

### I

## LINGVO, ĜIA ROLO KAJ ĜIA EVOLUO

**Lingvo kiel ligilo** Lingvo, parolo estas kombinaĵoj el sonoj kaj sonkompleksoj, kiuj servas al la homoj por iliaj interrilatoj. Lingvo estas ilo de interligo kaj interkompreno, helpante en la organizo de la laborprocedoj kaj agoj kiel de apartaj laboruloj, tiel same de la ope aŭ kolektive kunigitaj. Lingvo do estas ilo, kiu akcelas la efektivigon de tiu aŭ alia rezulto en la produktado.

En sia senĉesa vivbatalo la primitiva homaro palpe, paŝon post paŝo, lernis labori kaj utiligi diversajn ilojn kaj instrumentojn. La iloj kaj instrumentoj, utiligataj en la laboruzo de la homaro, difinis ĝiajn vivtradiciojn, nivelon de ĝia kulturo, ĝiajn bezonojn kaj ŝancojn.

Sur la bazo de la eltrovoj, kiujn atingis la primitiva tekniko kaj primitivaj labormetodoj, elkreskis la tuta kulturo de la homaro.

Kaj simile al tio, kiel aperis kaj senĉese perfektigis la primitivaj teknikaj iloj — aperis kaj senĉese perfektigis la instrumento de interligo kaj interkompreno — la lingvo.

**Homo—sociema besto** La leĝo de la senĉesa kaj persista vivbatalo rezultigis tion, ke jam de la pratempo la homo ĉiam sin trovis en la rondo de samuloj, vivis komunume, laboris kune kun sia komunumo, batalis por la vivo kaj penadis en la gajno de la nutraĵo. Primitivaj laborkolektivoj kaj primitivaj grupoj da ĉasistoj ĉiam povis esperi nekompareble pli grandajn prosperojn en la ĉasado, ol iu ĉasisto-solulo.

---

La ĉasistoj ope-kunigitaj povis entrepreni pelĉasadojn kaj embuskojn por la bestoj pli ampleksajn kaj sekve pli valorajn, laŭ la kvanto da felaĵo kaj viando. Kiam la homo solvis la sekreton de la fajro, estis multe pli facile subteni kaj gardi ĝin por la tuta gento, ol por ĉiu aparta gentano. Sammaniere kreskis la forto kaj rezisto kontraŭ la atakoj de la sovaĝaj bestoj, en la komuna kolektiva sindefendo.

Ĉiuj tiuj fortoj, prenitaj kune, faris ekonomian bazon por la firma genta unuiĝo de la primitivaj ĉasistoj-homoj. La unuopuloj pereis pro sia malforto kaj disigiteco. La forto estis flanke de la firme komuna, samcela organizaĵo. Per sia komuna laboro la apartaj homoj preparis vojon por la plua evoluo de la homaro. La kolektiva laboro fariĝis faktoro plej akcelanta ĉi tiun evoluon.

Tuŝante la saman temon, F. Engels skribis:

“La evoluo de la laboro, pro neceso, akcelis pli firman kunigon de la socianoj, ĉar dank’ al ĝi fariĝis pli oftaj la ŝancoj de la reciproka helpo en la komuna agado kaj por ĉiu sociano montriĝis pli klara la utileco de tia komuna agado. Mallongdire, la pli proksimaj al ni prahomoj venis al la fakto, kiam ili eksentis bezonon diri ion unu al alia.”

La bezono krei ian instrumenton — ilon, por transdoni diversajn sciigojn kaj pensojn, kreskis el la fakto mem de la kolektiva laboro. La kolektiva laboro difinis do ankaŭ la efektivigon de tiu ĉi bezono.

**La dumlaboraj krioj** Primitivaj sonformoj, percepteblaj por la aliuloj, estis la tiel nomataj “laboraj krioj”, akompanantaj la laborajn movojn. Mallonge kaj tre rezone diras A. Bogdanov:

“Kiam homo plenumas ian sian penon, tiam tiu ĉi peno influas liajn spiran kaj gorĝan aparatojn kaj instigas lin al certaj sonoj. Ekzemple, kiam Cignohakisto hakas per sia hakilo, lia sono estas: “ha”; kiam la ŝiptiristoj “burlakoj” de rivero Volga ĉiuj ope streĉas la tirŝnuregon, aperas profunda krio: “uhh”; ĉe la okcidenteŭropaj laboristoj, dum levado de io peza — “hopp”, aŭ “hop-la”; ĉe la ŝipistoj, turnantaj la kapstanon kun la ankroĉeno — “ho-hop”; ĉe la pavimistoj en Tunisio, dum mallevo de la peza ramilo, eliĝas krio: “ap-a” ktp.

Eĉ se ni ne vidas la laborantojn, sed aŭdas la similajn “laborajn interjekciojn” — ni scias, kion faras la laborantoj; estas por ni plene kompreneblaj signoj de la laboragoj, kvankam oni ne povus nomi ilin veraj “vortaj signoj”; ili diferencas de la vortoj per sia arbitra, elementa karaktero.

La dumlaboraj krioj servis kiel bazo, sur kiu en la pluaj epokoj evoluis la lingvo, kontentiganta certajn bezonojn de la homoj: “por diri ion unu al alia”.

## **La prakomencaj elementoj de la lingvo**

Komplikiĝintaj kaj multiĝintaj manieroj de la laboro sekvigis aperon de certaj sonoj, karakterizaj por tiu aŭ alia laborago.

Aperis sonoj, esprimantaj la agojn; la nombro de tiuj sonoj kreskis kaj variis, konforme al la ŝanĝo de la bazaj laboragoj, konforme al la ŝanĝo de tiuj aŭ aliaj formoj de la homa ekzistado.

La plimulto de la objektoj kaj aĵoj, pri kiuj la prahomo devis kaj povis havi ideojn, kaj pri kiuj li povis voli "diri ion", estis per si mem la objektoj de liaj laboragoj. Tiaj objektoj — ideoj estis: nutraĵo, ligno, fajro, ĉasaĵo kaj aliaj. Pro tio per la pluaĵaj sonoj estis eldiritaj ankaŭ ideoj pri tiuj aŭ aliaj objektoj kaj aĵoj de la labora medio.

Sonoj, kiuj transdonis la ideojn pri la apartaj laboragoj kaj apartaj objektoj de la laborefiko — estis do la prakomencaj elementoj de la homa lingvo.

Akomodante sin al la vivkondiĉoj de koncerna homa kolektivo, al ties produktivaj ŝancoj, al ties tekniko kaj vivtradicio, kreiĝis lingvo de tiu ĉi kolektivo.

Lingvo estis instrumento, ligilo, kaj simile al ĉiuj aliaj iloj estis determinata per la koncernaj produktivaj kaj ekonomiaj formoj de la ekzistado.

**Evoluo de la lingvo** Simile al metodoj kaj manieroj de l' uzado ĉe aliaj iloj — ankaŭ la uzmanieroj de la lingvo estis transdonataj de generacio al generacio. Konsekvence al tio estis konservata en certa grado la hereda tradicio de la lingvoformoj. La sperto de la antaŭaj generacioj estis konservata ĉe la generacioj postaj. En la lingvo konserviĝis ioma konstanteco de la signoj kaj laŭhereda tradicio de la lingvaj (sonaj) formoj, kun senco, en ili esprimata.

Sed la sperto de la antaŭuloj havas valoron kaj signifon nur en la okazo, se oni povas ĝin utiligi, se la ŝanĝo de la produktantaj kaj ekonomiaj faktoroj ne kondukas al ŝanĝo de laborkondiĉoj kaj vivmaniero. Se kontraŭe — tiam la sperto mem kaj ĝiaj konsistaj partoj fariĝas jam ne plu bezonaj. La ideoj, formoj kaj manieroj, ligitaj al la sperto de la pasintaj epokoj, ricevas ŝanĝojn aŭ tute malaperas el la novaj vivkutimoj kaj vivmaniero, kiuj naskiĝas pro la ŝanĝiĝintaj ekonomiaj faktoroj.

Ĉio ĵus dirita rilatas ankaŭ procedon de la laŭgrada lingvoevoluo. Neaplikado kaj neutiligo de iu parto el la antaŭa sperto kondukas al malapero de certaj ideoj. Kompletigo de la laborosperto havas kiel sekvon pliriĉigon de la lingvo, aperon de novaj ideoj kaj novaj lingvoformoj kun ili ligitaj.

La prakomenca labora sperto de la homaro estis tre malgranda.

---

Konforme al tio malgranda estis la nombro da vortoj kaj ideoj, por kiuj ekzistis la esprimoj en primitivaj lingvoj. La indiĝenoj de Aŭstralio kaj de kelkaj sovaĝaj gentoj de Afriko kaj Ameriko uzas ĝis nun por siaj bezonoj ne pli ol 250—300 vortoj.

La fama filologo *Max Müller* per vico da kunfrontigoj kaj komparoj venis al konkludo, ke la bazaj prakomencaj elementoj, sur kies fundamento elkreskis ĉiuj modernaj lingvoj estis 120 sonkunmetaĵoj — radikoj, ĉiuj proksime ligitaj al la primitivaj labormanieroj kaj agoj.

Aperinta en nia tempo, la tiel nomata *jafetida teorio* pri la deveno kaj evoluo de la lingvoj konceptas ĝenerale kaj baze la saman vidpunkton pri la dependo de la lingvoformo de la koncernaj vivmaniero kaj labormedio.

Pliriĉigo de la laborsperto, perfektigo de la teknikaj laboriloj kaj evoluo de la produktivaj fortoj rezultigis la nombran kreskon de la bazaj lingvoelementoj. En la modernaj lingvoj, enhavantaj esprimojn por ĉiuj necesaj ideoj de la nuntempa labora kaj teknika bezonaro, oni jam kalkulas ĉirkaŭ 80 000 bazaj ideoj kaj vortoj.

Lingvo, kiel kreitaĵo de certaj rilatoj de la produktado kaj de difinitaj formoj de la vivmaniero, povis naskiĝi kaj naskiĝis en ĉiuj okazoj, kiam la kolektiva kunlaboro de la prapatroj de la nuna homo prezentis por tiu ĉi naskiĝo sufiĉan kaŭzon kaj donis sufiĉajn ŝancojn por enmeti ĝin en taŭgan formon.

Tial estas supozebla ekzistado en la antikva tempo de certa nombro da memstare — pro la samaj kaŭzoj — aperintaj lingvoj, servintaj por la rilatoj kaj interkompreno de koncernaj grupoj da unuope loĝantaj prahomoj.

**Diferenciĝo kaj disdividiĝo de la lingvoj** Sed kun la nombra kresko de la prahomaro kaj de ĝiaj apartaj grupoj — gentoj kaj triboj, vastiĝis teritoriaj limoj de la lokoj, enloĝitaj de homoj. En diversaj lokoj, konforme al ties geografiaj kaj naturhistoriaj ŝancoj, la homoj estis devigataj variigi siajn labormetodojn kaj kutimojn. La variigo de la produktantaj kaj laboraj metodoj kondukis siavice al vastiĝo de la sperto kaj al pliriĉigo de la lingvo, kiun ili uzis.

La elfalo de kelkaj elementoj de la antaŭa sperto kaj de iuj pli frue adaptitaj labormetodoj kaŭzis formortadon de kelkaj apartaj antaŭaj lingvoformoj. Malsamaj vojoj en la evoluo de la labormetodoj kaj laborsperto ĉe diversaj grupoj de la homaro kondukis al ŝanĝiĝo de la lingvoformoj, al apero de novaj dialektoj kaj lingvoj.

**Limoj de la lingvo** La teritoriaj limoj en la uzado de iu lingvo kutime difiniĝis per teritorio kun komunaj ŝancoj en la produktado kaj kun komunaj metodoj de la laboro.

---

Sed nur ĉe la tute samaj kondiĉoj de la vivmaniero povis konserviĝi la tute samaj produktiloj, kaj en ilia nombro ankaŭ la tute samaj lingvoformoj.

Tial se sur la sama teritorio loĝis malsamaj popoloj kun malsama vivmaniero kaj malsamaj kutimoj en la produktado, hereditaj el la pasinta tempo — en tiu okazo la malsamaj popoloj konservis la malsamajn lingvojn laŭ siaj vivmaniero kaj laborkutimoj.

**Asimiliĝo, kunfandiĝo de la lingvoj** Ĉe la senĉesa nomada migrado de apartaj homaj komunumoj — gentoj, triboj kaj popoloj — de unu loko al alia, diversaj grupoj, uzante malsamajn labormetodojn kaj malsamajn lingvojn, interkomunikiĝis kaj kontaktiĝis. Se en tiuj cirkonstancoj, pro reciproka interŝanĝo de la laborsperto kreiĝis sama vivmaniero, se havis lokon unuiĝo de la laborsperto ĉe la kontaktiĝantaj grupoj kaj popoloj, la lingvoj de tiuj popoloj venis al neevitebla kunfandiĝo — asimiliĝo. La lasta fenomeno forestis nur tiam, kiam pro diversaj kaŭzoj la vivmaniero kaj labormetodoj de la popoloj, loĝantaj sur la sama teritorio, restis memstaraj kaj malsimilaj.

Se okazis procedo de la kunfandiĝo — asimiliĝo de la lingvoj, tiam kreiĝis iu nova lingvo, pli akomodita kaj konforma al la unuigita laborsperto de la gentoj kaj popoloj, ligitaj per komuneco de la teritorio kaj per unueco de la laborprocedoj.

Perforta subpremo de unu popolo rilate al alia, deviga kunfandiĝo de malsamaj lingvoj neniam kaj nenie sukcesis, se nur tiu kunfandiĝo ne estis bezona pro la unuigo de la mastruma kaj labora spertoj, pro la starigo de komunaj formoj de la produktado kaj vivmaniero ĉe la koncernaj popoloj.

Ĉe la kunfandiĝo — asimiliĝo de la lingvoj, en la nova lingvo ricevis pligravecon kaj prefereblan staton la konsistaj elementoj de la lingvo de tiu gento aŭ popolo, kies vivmaniero en la koncernaj cirkonstancoj estis pli stabila, pli konforma ol la mastrumaj ŝancoj de la koncerna teritorio, de la lingvo de tiu popolo, kies respektiva teknika kulturo estis sur pli alta ŝtupo de la progreso. La lingvoj de la popoloj venkintaj aŭ konkerintaj mem tre ofte asimiliĝis, aŭ estis elpelitaj flanke de la lingvo de la venkita popolo, kiu staris sur pli alta ŝtupo de la teknika progreso kaj estis pli akomodiĝinta al la raciaj metodoj de la mastrumado kaj laboro.

**Lingvoj ekzistantaj** Ĉiuj lingvoj de la nun vivantaj popoloj kaj ankaŭ la lingvoj de la popoloj, pli frue vivintaj kaj nun malaperintaj, prezentas per si rezulton de treege komplika kunagado de diversaj labormedioj kaj diversaj laborspertoj, ligitaj al la multmanieraj formoj de la vivo ĉe la diversaj grupoj de l' homaro, kiuj reciproke interkontaktiĝis. La proksimeco de kelkaj lingvoj, ilia

---

posedo de la formoj samaj aŭ proksimaj laŭ sia enhavo aŭ konstruo, atestas, ke la vivmaniero de tiuj popoloj kaj ilia laborsperto estis ĝenerale samspeca kaj havas komunajn radikojn. Simil-ekzemple estas proksimaj la lingvoj slavaj: rusa, serbo-kroata, ukrainia, bulgara, pola k. a., kiuj havis en la pasintaj epokoj unu saman prafontan lingvon, kiu estis lingvo de la popolo, iam vivinta sur unu komuna teritorio.

La antaŭuloj de la lingvoj modernaj, la lingvoj greka, latina, gota k. a. postlasis siajn restaĵojn en la literaturo kaj diversaj skribaĵoj, konservitaj ĝis nun. Komparante ĉi tiujn literaturojn kaj skribaĵojn, oni povas juĝi pri la grado de reciproka proksimeco de tiuj lingvoj kaj kiel sekvon el tio: pri la gradoj de la proksimeco de la vivmaniero ĉe la popoloj, uzintaj ĉi tiujn lingvojn.

La kompara lingvoscienco, utiligante ĉi tiun metodon de la esploro de diversaj lingvoj, ricevas eblecon fari vicon da valoraj konkludoj pri la historia pasinteco kaj historia evoluo de la homaro.

Aserto, farata de scienculoj, ke ĉiuj eŭropaj lingvoj devenas el unu sama radiko, devas signifi ke la modernaj eŭropaj popoloj havas prapatrojn, vivintaj iam en malproksima pasinta epoko kune, en la sama labora vivmaniero kaj en komuna por ĉiuj labormedio.

**Miksitaj lingvoj, ĵargonoj** La nuntempa ekzisto sur la terglobo de ĉirkaŭ 800 diversaj lingvoj kaj kelkmil dialektoj — signifas, ke en la nuna momento ekzistas sur la terglobo tia sama nombro da malsamaj vivmanieroj kaj labormedioj, kiuj aperis pro la plej diversforma reciproka kunagado de la spertoelementoj, malapero de ideoj de la diferenciĝo kaj asimiliĝo. Sed kiam la apartaj popoloj, uzantaj por siaj vivbezonoj malsamajn lingvojn, tamen venis al kelkia kontakto — ili kvazaŭ per la vivo mem faris kelkajn miks-itajn dialektojn, ĵargonojn, bezonajn por la interkompreniĝo de la reprezentantoj de tiuj malsamaj popoloj. Sub tiuj ĵargonoj oni klasifikas la mezepokan ĵargonon de la Mediteraneaj marbordoj “Lingua franca” (miksaĵo el la franca, hispana, itala, greka, turka, araba k. a.) kaj la modernajn: la sudĉinan “ĉinook”, Pidgin-English, kaj tiun rusĉinan lingvon, kiu estas konata al ĉiuj loĝintoj en la Ekstrema Oriento kaj kiu, malgraŭ ĝia ŝajna absurdeco, tamen posedas siajn proprajn gramatikajn regulojn kaj eĉ esceptojn — unuvorte ĉion, kion devas havi, laŭ la opinio de scienculoj, ĉiu embria lingvo.

Karakteran trajton de tiuj miksitaj lingvoj-ĵargonoj prezentas la *malvastamedio* por ilia apliko, ilia helpa destino. Ili estas uzataj nur ĉe la rilatoj de la malsampopolaj reprezentantoj, el kiu ĉiu parolas en la rondo de la samgentanoj sian gepatran lingvon.



**La vojoj de la  
plua evoluo de  
la lingvo** Ĉiu aparta lingvo estas submetata al la samtempa efiko de la faktoroj diferencigaj kaj asimiligaj. En la frua epoko de la homa evoluo, en la epoko de ĝia infaneco, la faktoroj de la lingvodiferencigo efikis tre forte. La maldensa loĝantaro de la terglobo, foresto aŭ malfacileco de trafiko kaj de rilatoj inter apartaj teritorioj estis kaŭzoj por la mastruma apartiĝo de la nombre malgrandaj gentoj kaj popoloj. La mastrum-ekonomia apartiĝo kaŭzis apartiĝon de la lingvoformoj.

Tute kontraŭan tendencon en la lingvoevoluo oni povas observi nuntempe. Kulturo kaj civilizacio de apartaj popoloj komencas ensorbi elementojn de iuj internaciaj, tuthomaraj kulturo kaj tekniko. La alta tekniko kaj mekanikigo de la produktiloj, efektiviĝitaj en la landoj eŭropaj, per forto de la historia neceso, estas transportata kaj transplantata al aliaj, kulture kaj teknike malpli progresintaj landoj. Kiel sekvon de tio ni observas en la tuta mondo senduban internaciigon de la produktantaj metodoj kaj labormanieroj kaj kiel rezulton — plifortiĝon en la asimiliĝo de la plej diversaj lingvoformoj. La plifortigitajn formojn de la asimiliĝo, kiam la samaj parolturnoj kaj formoj aperas en la malsamaj lingvoj, oni povas difini kiel internaciigon de la lingvo. Bazan kaŭzon por la simila asimiliĝo donas tio, ke la ideoj, malpropraj al la lokaj vivkondiĉoj, transportataj el fremda vivkutimo kaj el fremdaj landoj, ne povas esti tuj esprimataj per la posedataj en la koncerna lingvo lokaj lingvoformoj kaj parolturnoj. Krom tio, la nacilingvaj terminoj por tiuj "importitaj" ideoj montras sin nekompreneblaj al tiu, kiu importas tiujn ideojn; por la aborigenoj la similaj novbakitaj naciaj terminoj restus tute egale nekonataj, novaj kaj destinitaj esti aparte, memstare komprenataj, kune kun la ideoj, kiujn ili esprimas.

Ĝuste pro tiuj kaŭzoj malprosperas en la rusa lingvo la provoj anstataŭi tiajn internaciajn terminojn kiel "galoŝo", "aŭtomobilo", "velocipedo" (biciklo) k. a. per la vortkombinoj de la gepatrolingva origino: *m o k r o s t u p , s a m o ĥ o d , s a m o k a t* k. a. Kaj se en la oficiala lingvo, en la milita kaj administra uzado la vorto "samokatĉik" (biciklisto) trovis ioman aplikon, tamen en la ĝenerala, ĉiutaga vivo certe ne ekzistas iu espero forigi la sufiĉe internacian terminon "velosipedist" (biciklisto). Samekzemple la germanaj terminoj "Kraftwagen" por aŭtomobilo, "Fernsprecher" por telefono k. a., naskitaj de la ŝovinisma agitado, havas nenian esperon anstataŭi la respektivajn internaciajn formojn. La berlinanoj, kiel antaŭe, malgraŭ siaj personaj aŭ politikaj vidpunktoj kaj konvinkoj, ĉiam daŭrigas nomi la aŭtomobilon ne per la peza, germanigita "Kraftwagen", sed per simpla kaj facila internacia "Aŭto".

La popoloj, elirantaj sur la vojdon de la memstare ŝtata pro-

---

greso, nepre prunteprenas por siaj bezonoj novajn vortojn ĉu de la nacio, sub kies regado ili antaŭe troviĝis, ĉu el la internaciigita provizo de la vortoj. Tiun sorton havas la nacioj de Ukrainio, Blankrusio, Latvio, Litovio, Ĉeĥoslovakio k. a. Tiun sorton havas ankaŭ la ĵus aŭtonomiĝintaj nacioj: ĉuvaŝa, karela, zirjana, baŝkira k. a.

La koloniaj kaj aziaj popoloj, kontaktiĝante kun la eŭropanoj kaj aliĝante al la internacia eŭropa kulturo kaj tekniko, estas devigataj lerni la eŭropajn lingvojn kaj preni el ili terminaron, uzatan en la adoptata eŭropa tekniko. Ĉi tiuj internaciaj esprimoj kaj formoj komencas ludi pli kaj pli grandan rolon en la evoluo de la naciaj lingvoj. En diversaj lingvoj estas multaj centoj kaj miloj da internaciaj vortoj, kiuj diferencas en diversaj landoj nur iomete. Sufiĉas, se ni montros kelkajn el ilia nombro: lampo, telegrafo, telefono, radio, estrado, lustro, lokomotivo, ktp.

Similaj esprimoj kaj terminoj iafoje ne nur akompanas la enkondukon de novaj ideoj, sed eĉ konkuras kun la pli frue ekzistantaj pure nacilingvaj terminoj por tiu aŭ analogaj ideoj kaj eĉ elpelas ilin el la uzado.

Karakteraj ekzemploj tiurilate povas esti ruslingvaj vortoderivaĵoj: “poloĝenije” kaj “sostoĵanije” — la unua de la vorto “leĵatj” (kuŝi), la dua de la vorto “stoĵatj” (stari). Nuntempe ĉi tiuj du derivaĵoj perdis siajn antaŭajn signifojn kaj la ideoj, per ili esprimataj, tute malklariĝis. Aliflanke kelkaj internaciaj terminoj ĝustigis la ideojn, difinitajn per tiuj du vortoj. Tiuj internaciaj terminoj estas:

- a) situaciō (troviĝi en “poloĝenije”),
- b) tezo (proponata “poloĝenije”),
- c) pozicio (okupata “poloĝenije”),
- d) stato (status) — (“sostoĵanije” proprasence),
- e) statuto (“poloĝenije”, “ustav”).

En la donita ekzemplo la rusa lingvo aŭ ne ĝuste difinas per la du “rusaj” terminoj kvin ideojn, aŭ uzas ses terminojn: du “rusajn” kaj kvar “internaciajn” (la termino “stato — status” ne estas enkalkulata), anstataŭ la kvin terminoj tute ekzaktaj, sed de pure internacia deveno.

Pruvante per la faktoj de la senĉesa asimiliĝo de ĉiuj lingvoj kaj de la enpenetro en ĉiujn lingvojn de pli kaj pli granda nombro da internaciaj terminoj, oni povus supozi la nepran estontecan kunfandiĝon de ĉiuj lingvoj kaj starigon de unu komuna lingvo, konforme al la bezonoj de la moderna tuthomara kulturo kaj tekniko. Sed eĉ se la internaciaj formoj en niaj lingvoj ludas ĉiam pli kaj pli grandan rolon, — tiu fakto estas dume tre malproksima ĝis la kristaliĝo de la komunaj tuthomaraj lingvoformoj.

---

**La parola tradicio** La asimiliĝon kaj internaciĝon de la ekzistantaj lingvoj tre kontraŭstaras la lingva tradicio, ludanta en la historio de la lingvoevoluo tre efikan rolon. Ankoraŭ en la antikeco la faktoro de la lingva tradicio havis sian haltigan influon rilate al asimiliĝo de la lingvoj. Ĉi tiu haltiga influo sin bazis, ĉefe, sur la sperto kaj tradicio, transdonataj buŝe de unu generacio al alia.

La tradicio estas pozitiva elemento rilate la utiligon de la laborsperto de la antaŭaj generacioj. Sed oni devas konsideri, ke la lingva tradicio, en sia esenco, precipe akcelas la konservadon kaj neŝanĝeblon de la lingvoformoj. La influo de la tradicio rilate la konservadon de la senca enhavo, kiun oni enmetas en tiun aŭ alian formon, estas multe pli malforta. El tio rezultas laŭgrada ŝanĝo de ideoj, ligitaj al tiu aŭ alia formo, kaj apero en la lingvo de tuta vico da malkonformaĵoj, "idiotismoj" kaj malĝustaĵoj. Tial en la rezulto de la dume ricevita sperto en la natura lingvokonstruado ne ekzistas motivoj por esperi rapidan kaj facilan procedon de la kunfandiĝo de la lingvoj kaj arbitran naskiĝon de iu nova, la tuthomara. En tio sentiĝas mankoj, kiujn havas la influo de la parola lingvotradicio.

**Skriba lingvo** La bezono transdoni pensojn al lokoj malproksimaj kreis lingvon skriban. La skriba lingvo signifas komencon por la enmiksiĝo en la naturan evoluon de la lingvo per artefaritaj, kreitaj de la homo, leĝoj. La unua skriba lingvo (hieroglifoj de egiptoj, ĉinoj, antikvaj meksikianoj k. a.) esprimis tute neniajn vortojn, sed nur simbolojn, kiuj devis elvoki la sonan rememoron kaj per ĝi koncernan bildon de la transdonata ideo aŭ penso mem.

Simila ideografa skribo ne povis akceli la buŝan tradicion en ĝia konservado de la respektivaj sonkombinoj. Ni vidas ke ĉe la ĝenerala komuneco de la ĉina skribo por la tuta Ĉinio, ĝin uzas ne malpli ol 7 diversaj popoloj de Ĉinio, kun diversaj lingvoj.

Aperinta post la hieroglifoj sona alfabeto, estante per si mem neniel perfekta, ankaŭ ne ĉiam ekzakte transdonis la prononcadon, diversajn akcentojn kaj ties variaĵojn. Neperfekta alfabeto kaj neperfekteco en la transdono de la sono per la signo, simile al la antaŭaj simbolaj signoj, fiksis por la ideoj certajn grafikajn (skribajn) esprimojn, sed ne garantiis nevarieblecon de la koncernaj son-esprimoj.

Kiel ajn, tamen la ekzisto de la difinitaj skriboformoj, precipe de la laŭsona skribolingvo, estis faktoro, plifortiganta la influon kaj signifon de la lingva tradicio. Paralele kun la parola tradicio kreiĝis tradicio de la skriba lingvo.

Malsamaj alfabetoj kaj diversaj manieroj en la prononcado de

---

la skribita lingvaĵo, faris kaj faras certajn barojn por la lingva asimiliĝo — do al la plua internaciigo de la lingvoj. La internaciaj terminoj en diversaj landoj, dank' al la malsamaj prononcoleĝoj, akiras tute ne internaciajn sonajn formojn.

En la anglolingva sonformo “intĕrnejs'nal” (laŭ la vortaro de John Walker: “in-<sup>2</sup>tĕr-na-shun-<sup>2</sup>al<sup>4</sup>”) ĉu iu facile rekonas la internacian terminon “international”; malgraŭ tio, ke tiu ĉi termino estas skribata en ĉiuj eŭropaj lingvoj, uzantaj la latinan alfabeton (en tiu nombro ankaŭ en la angla lingvo) tute same.

Partaj reformoj — simpligo de alfabeto kaj ortografio, estas sendube eblaj, sed ili estas akompanataj per grandaj perdoj kaj penoj kaj devas esti konsiderataj jam kiel arta reguligo de la lingvoevoluo. En 1918 jaro en Rusio estis forigitaj du arkaikiĝintaj literoj Ъ (jatj) kaj ъ, sed se tiun relative malgravan reformon akompanis multaj obstakloj, oni devus venki nekompareble pli multan nombron da obstakloj dum la plisimpligo kaj konformigo de la prononcado kaj skriba lingvo en tiaj lingvoj, kiel franca aŭ angla.

**Gramatiko** La lasta kaj sendube plej grava, pro sia rezisto, faktoro, kiu haltigas la evoluon de la lingvoj laŭ la vojo de ilia internaciigo, estas gramatiko.

La reguloj de gramatiko estas necesaj por konservi la utilajn por koncerna evolugrado de la lingvo metodojn de la skriba lingvo kaj por, laŭ ebleco, forigi la superflujajn kaj malutilajn. Sed samtempe kun tio, la gramatiko estas ĉefa haltigilo en la internaciigo de la lingvo. Se en la lingvon, pro nepraj cirkonstancoj kaj neceso, penetras tiuj aŭ aliaj fremdlingvaj, internaciaj vortoj, ili estas en la nacilingva gramatiko aliigataj kaj alifasonigataj. Se la elementoj de internaciigo en la leksikona materialo de la modernaj lingvoj estas sufiĉe multenombraj, la elementoj de internaciigo en la gramatikoj de la modernaj lingvoj tute forestas aŭ estas treege malmultaj.

**Elementoj de la lingvokonstruo, haltigantaj la internaciigon** Do, la alfabeto, skriba lingvo kaj gramatiko, ekzaktigante la lingvoformojn, leĝe reguligante kaj fiksante ilin, akcelas la ekzistantan buŝan tradicion en la kontraŭstaro de la lingvo al fremdaj influoj kaj en certa grado konservas la ekzistantajn lingvojn de la influo de la faktoroj internaciigaj.

La elementoj, kiuj formas la lingvan tradicion: la parola tradicio, alfabeto, reguloj de la skribo kaj gramatiko, malhelpas la kunfandiĝon de la lingvoj, faras tiun kunfandiĝon tute nebla ĉe la nuntempa stato de ilia plua evoluo.

Ĉe la ĝenerala instruiteco la forto kaj influo de la lingva tradicio des pli multe grandiĝas.

---

La ekzistantaj formoj de la konstruo de aparatoj — iloj por transdono de pensoj kaj ideoj en diversaj lingvoj baras la vojon al la plua lingva internaciigo.

Sed la internaciigo de la lingvo, kondukanta al la fina starigo de unu komuna lingvo — estus granda sukceso de l' homaro kaj de ĝia kulturo, kiu treege akcelus la kreskon de tiu ĉi tuthomara kulturo.

**La latina kaj aliaj mond-lingvoj**

Estas vero ke partan rolon de la mondlingvo ludis siatempe la lingvoj de la grandaj kulturaj nacioj. Tiuj lingvoj en diversaj epokoj kaj por diversaj lokoj estis: ŝumera, sanskrita, hebrea kaj pli poste greka. La romaj legianoj dum la senĉesaj venkriĉaj militoj de la respubliko kaj poste de la imperio, ĉie propagandis kaj vastigis la vulgaran roman lingvon. La superaj klasoj de la venkitaj popoloj baldaŭ akceptis la lingvon de la venkintoj, kiuj alportis kun si altan kulturon. Sed sekvis tion la invado en la Okcidentan Eŭropon de la gotoj kaj de aliaj germanaj gentoj. Komenciĝis la nova Babelo; la lingvoj kunfandiĝis, ŝanĝiĝis kaj en la mezepoko la latina lingvo fariĝis posedaĵo nur de la superaj instruitaj klasoj.

En la XVII jarcento la mortinta latina lingvo sin montras jam malsufiĉa por la bezonoj de la eŭropa civilizacio. Eĉ la kripligoj kaj barbarismoj, kiujn enkondukis en la lingvon famaj scienculoj, ne povis ĝin savi. La monda lingvo, almenaŭ por diplomatio kaj superaj klasoj fariĝas lingvo franca.

Ĉiuj tiuj, atingintaj siatempe provizoran sukceson, naciaj lingvoj kaj en ties nombro ankaŭ lingvo latina, pretendis esti "mondaj". Kaj ĉiuj ili siavice, estis forigitaj de la lingvoj de aliaj popoloj, pli prosperaj progrese kaj kulture. La eterna konkurado inter diversaj popoloj malhelpis al iu nacia lingvo fariĝi efektiva tutmonda lingvo. Tio estas tre komprenebla fakto: la akcepto de la lingvo de iu popolo kiel tutmonda donus al tiu popolo kaj ĝiaj anoj grandvalorajn privilegiojn, dum la aliaj popoloj restus sen videbla profito.

## II

### LA ARTA REGULIGO DE LA LINGVOEVOLUO

**Primariaj elementoj en la reguligo de la lingvo**

La alfabeto, reguloj de ortografio kaj gramatiko estas bazoj reguliloj de la lingvo, konscie starigitaj kaj konscie alprenitaj de la homo. Tiuj reguliloj, esprimitaj per serio da gramatikaj reguloj kaj leĝoj, havas sian rektan destinton, firmigi certajn formojn de la lingvo kaj fiksi certan ordon por ilia konstruo kaj uzado.

Aliflanke — ĉi tiuj foje starigitaj kaj restantaj neŝanĝeblaj,

---

malsamaj ĉe diversaj lingvoj, reguliloj haltigas la pluan evoluon de la lingvo kaj unuavice haltigas la rimarkeblan internaciigon de la lingvoj, kondukantan al ilia estonta kunfandiĝo.

Sed se tiuj reguliloj de la lingvo estas produktaĵoj de la konscia kreado de la homo, kaj kies kreon kaŭzis certaj neceso kaj bezono, tiam aperas demando, ĉu la lingvo estas ĝenerale io netuŝebla kaj ĉu oni ne povus organizite ŝanĝi, akomodi kaj rekonstrui la leĝojn kaj regulojn de ortografio kaj gramatiko, difinantaj la lingvoformojn, neniel imitante tiun elementan, naturan evoluon, kiun ni ŝajne observas en la procedo de la evoluo de la ekzistantaj lingvoj.

**Lingvo popola kaj lingvo literatura** Por plene solvi ĉi tiun demandon, ni devas akcepti, ke tio, kion ni nunmomente nomas lingvo de certa popolo, esence estas kolekto da diversaj lingvoj, dialektoj kaj parolmanieroj kaj unuavice:

1. Lingvo parola — popola, lernata de infano ĉe siaj gepatroj, kaj —

2. Lingvo literatura, lernata en lernejo kaj per librolegado.

Ĉiu el tiuj lingvoj, popola kaj literatura, povas esti siavice disklasigita je kelkaj novaj subspecoj.

Tiel ekzemple, parolmaniero — lingvo de apartaj lokoj, provincoj, distriktoj, eĉ de vilaĝaj komunumoj kaj vilaĝoj posedas siajn proprajn ecojn kaj diferencas de la lingvo, parolmaniero de la najbaraj regionoj.

Sammaniere lingvo literatura, uzata de apartaj homoj, apartaj homgrupoj kaj literaturaj tendencoj, estas certagrade malsimila al la lingvo de aliaj aŭtoroj, aliaj homgrupoj kaj tendencoj.

Propradire, ĉiu homo, en certaj limoj, kreas “sian lingvon”, tiun lingvon, kiun li uzas kaj per kiu li interkompreniĝas kun la samrondanoj.

Sed se la individua kreo en la popola lingvo perdiĝas kaj restas nerimarkita, sin montrante nur kiel pli aŭ malpli akceptitaj kaj aplikitaj novaj enkondukaĵoj, — la individua kreo en la lingvo literatura estas ĉiam rimarkebla kaj ĉiam oni povas konstati la aŭtoron, iniciatinton de tiuj aŭ aliaj ŝanĝoj kaj aldonoj, enkondukitaj en la lingvon kaj pli poste en ĝin enradikiĝintaj.

Krom tio la skriba, presita kreo de la novaj lingvoformoj estas ĉiam pli efika, havas pli multajn ŝancojn disvastiĝi, fariĝi socia kaj enradikiĝi, ol la individua, nefiksata skribe kreado de la novaj formoj en la lingvo popola — parola.

Konsekvence al tio, se ni volas konstati la faktojn de la arta reguligo de la lingvo kaj de ĝia akomodigo al tiu aŭ alia bezono kaj al taskoj, starigataj per la vivo — ni devas nin turni unuavice, kompreneble, al la lingvo skriba, libra, literatura.

---

**Kreado de la literaturaj lingvoj** — Koscie organizitan reguligon de la lingvo en pli aŭ malpli granda rilato vidis ĉiuj literaturaj lingvoj de ĉiuj kulturiĝintaj popoloj, en ties nombro ankaŭ la lingvo rusa.

Ankoraŭ en la IX. jarcento de tiel nomataj “apostoloj” kaj “klerigintoj” de la slavo, du fratoj **Cirilo** kaj **Metodo**, prilaboris regularon por la ortografio kaj gramatika fundamento de la slava lingvo, laŭ la dialekto de la macedoniaj slavo. Per tio ili kreis laŭesence la tutslavan parolon, la tutslavan literaturan lingvon, kiun uzas la orienta ortodoksa eklezio ĝis nun.

Sed plej karaktera tiurilate estas historio de la germana literatura, aŭ t. n. “nova suprogermana lingvo”, en fina formo fiksita per la traduko de la biblio, kiun faris **Luther**. Antaŭ la Reformacio la germanoj ne havis komunan literaturan lingvon. En diversaj regionoj de la germana imperio dominis apartaj parollingvoj, konserviĝintaj eĉ ĝis nun. Kiam oni bezonis uzi iun tutimperian lingvon, oni uzis por tiu ĉi celo lingvon latinan. Nur komencante de la fino de la XIII. jarcento la paktoj kaj dekretoj de la tutimperia signifo estas redaktataj jam en la lingvo germana. Sed iajn ekzaktajn, fiksitajn formojn tiu ĉi kancelaria lingvo ne havis. Por la unua fojo, en la imperiestra kancelario en Praha, kie en tiu epoko dominis la miksita — inter la suda kaj mezgermana — dialekto, oni komencis prilabori la normojn kaj bazajn regulojn por la tutgermana skriba lingvo. Poste, en la jaro 1490, oni faris oficialan interkonsenton de la du regnaj kancelarioj — de la imperiestra kaj tiu de la saksa Kurfürst — pri la uzado de tiu ĉi lingvo en la reciproka, oficiala korespondo. Al la sama tempo rilatas ĝia gramatika prilaboro. La sekretario de la imperiestro Maksimiliano **Hans Krachenberg** skribis latine la unuan “gramatikon de la germana lingvo”.

Samtempe la oficiala, prilaborita en la kancelarioj, lingvo penetris en lernejojn, en la librojn kaj privatan interkorespondon. La invento de la presarto akcelis la pluan disvastigon de la komune akceptita, komprenata tra la tuta Germanio, lingvo. Sur multaj presitaj libroj de tiu kaj sekvantaj epokoj ekzistas surskriboj, ke la libro estas presita “en vera, ĝenerala germana lingvo”. Sed malgraŭ la komunaj lingvoformoj apartaj diferencoj de la lokaj dialektoj daŭris konservataj eĉ en presitaj libroj. Komencante tradukon de la biblio, **Luther** unue sekvis la ĝeneralan uzatan lingvon, sed plue li ekuzis novajn, tre ofte artefaritajn formojn, senigitajn de la troaj dialektaj koloroj. La leksikono, sintakso kaj stilo de la moderna germana literatura lingvo entute estas kreaĵo de **Luther**. En la unua periodo al kelkaj lokaj eldonoj de la biblio de **Luther** oni aldonis eĉ apartajn “listojn de fremdaj vortoj”, uzataj de **Luther**, sed nekonataj en la koncerna loko.

---

Tamen jam post jarcento la lingvo de Luther fariĝas oficiale akceptita en ĉiuj regionoj de Germanio kaj eĉ en Svisio. La germana literatura lingvo, ne apartenanta al iu regiono de Germanio kaj arte konstruita, okupis apartan situacion inter la popolaj dialektoj. La evoluo de tiu ĉi lingvo en pluaj epokoj estis direktata plejparte teorie, gramatike, sed ne per elementa evoluo, propra al la popolaj parollingvoj.

Analoge kuraĝan kaj pure artan efikon ricevis en pli malfrua epoko, komence de la jaro 1801, lingvo hungara, ĝis tiam nekulturata. Sufiĉas, se ni notos ke ĝis la jaro 1843 oficiala lingvo de la hungaraj lernejoj estis lingvo latina Ferencz Kazinczy estis iniciatinto de la nova movado en la hungara literaturo. Li volis fari la lingvon riĉa, ĝusta, elasta. Li kreis amason da novaj vortoj. Parto de ili kun la tempo foriĝis el la uzado, sed granda parto da novaj esprimoj kaj vortoj, mankintaj en la hungara lingvo, laŭ bona iniciato de Kazinczy, enradikiĝis kaj ekvivis.

**Konscia kreo de modernaj lingvoj. Sanskrita lingvo** Ni vidas ke la vojo de decida, konscia enmiksiĝo en la regionon de la lingvokonstruo estas neniel esceptebla, ke tiu ĉi vojo jam estis trairita de kelkaj literaturaj lingvoj de diversaj popoloj.

La artefaritaj normoj kaj formo dum tiu ĉi vojo prilaboritaj kaj starigitaj ne nur reguligis evoluon de la lingvo kaj fiksas ties ioman unuecon, sed ankaŭ akcelis starigon de komuna interkomprenilo por la personoj, uzantaj diferencajn popolajn dialektojn kaj parolmanierojn. Ekzemple la germana literatura lingvo ludis rolon de tia kunigilo. La historio tamen konas ankoraŭ aliajn, pli karakterajn ekzemplojn, kiam la homa racio, konsiderinte koncernajn bezonojn, — konstruis el la lingva materialo de la pasintaj epokoj jam tute novajn preskaŭ tute ne ekzistantajn artajn formojn de novaj lingvoj.

Tiamaniere, en la historio de la lingvoevoluo ni eltrovas ne nur vojojn de la evoluo, sed ankaŭ vojojn revoluciajn — konscian, pripensitan kaj interkonsentitan lingvokreon.

Bonegan ekzemplon de simila konscia kreado, de konkorda efiko al la lingvo flanke de la novaj reguligaj elementoj prezentas la lingvo sanskrita.

En la nordorienta Hindio, en la valo de Penĝab, antaŭ kvar mil jaroj vivis popolo, veninta tien el iu nekonata loko. La geografia kaj vivtradicia komuneco de la gento sekvigis la ekziston de komuna lingvo, nomita de la antikvuloj lingvo veda. Iom post iom la teritorio, okupita de tiu ĉi popolo, vastiĝis kaj etendiĝis tra la valo de rivero Ganges kaj tra la tuta Hindia duoninsulo. En la



---

daŭro de sia miljara historio la popolo, pro multaj lokaj cirkonstancoj, dividiĝis teritorie kaj disfalis je nombro da apartaj gentoj. Konforme al tio dividiĝis ankaŭ la veda lingvo.

En tiu malproksimega epoko portantoj de la kulturo kaj de lingvaj tradicioj estis scienculoj — pastroj. Ĉiu aparta gento kreis sian propran skolon de pastroj. Ĉiu pastra skolo havis apartajn regulojn de la prononcado de la antikvaj sanktaj tekstoj. Tiuj reguloj plifortigis la disiĝon kaj diferencigon de la multenombraj dialektoj.

Naskiĝis neceso krei komunan lingvon, kiu ligus la diversajn gentojn. El la antaŭaj malsamaj reguloj de prononcado, deklinado, konjugacio kaj vortoderivado iom post iom kreiĝas unuformaj bazoj de unu komuna lingvo. Tiu ĉi lingvo ricevis la nomon "Sanskrito", kio signifas: perfekta, purigita.

Bramano P a n i n i en IV. jarcento antaŭ nia ero, kompletigis ĉi tiun ellaboron de harmonia gramatiko kaj de komuna skriba lingvo. La laboro de P a n i n i konsistis el mallongaj sentencoj, nombre ĉirkaŭ 4000. En ili per pure abstraktaj matematikaj manieroj, rememorigantaj sistemon de la algebraj signoj, estas disvolvata la tuta konstruo de la sanskrita lingvo.

Sanskrito estas precipe riĉa je vokaloj, kio donas al ĝi grandan sonecon. Ĝi posedas vokalojn longajn, mallongajn kaj diftongojn (entute 13).

P a n i n i difinas la kvaliton de la sonoj tiamaniere:

1. Ĉiu konsonanto estas duone pli mallonga ol la mallonga vokalo.

2. La longa vokalo, aŭ diftongo (aj, aŭ) estas duoble pli longa ol la mallonga vokalo.

La loko por akcento en Sanskrito ne estis fiksita.

Laŭ la regularo de P a n i n i, la akcento sin bazas sur la tonleviĝo en la akcentata silabo de la vorto, t. e. ĝi estas muzika.

La sonoj estas submetataj al ŝanĝo ĉe ilia reciproka renkontiĝo interne de la vorto. Ĉiuj tiuj ŝanĝoj estas ĝuste reguligataj per gramatiko, ekz.:  $a + i = e$ ;  $a + u = o$ , ktp.

En la deklinado oni distingas 3 genrojn, 3 nombrojn (unu-nombro, dualo kaj multenombro) kaj 8 kazojn. Krom tio, la deklinado varias laŭ la vokaloj, enirantaj en la bazon de la deklinataj vortoj.

Apartaj reguloj ekzistas por la deklinado de la numeraloj kaj pronomoj.

Generale, malgraŭ la komplikecon de la lingvoformoj, ĉiuj ili estas prilaboritaj kaj reciproke harmoniigitaj per la koncernaj gramatikaj reguloj.

---

Dum la dekoj kaj centoj da jaroj en tiun duone artefaritan, aŭ ĉiuokaze arte reguligitan lingvon, estis tradukita ĉio, kio estis valora en la literaturo de Hindio. La lingvo mem fariĝis propraĵo de ĉiuj kleraj hindoj.

La antikva veda lingvo samtempe en la popolamaso daŭre disiĝis kaj formis kelkajn tiel nomitajn prakritajn dialektojn.

Sed la ekzisto de Sanskrito permesis al Hindio, malgraŭ ties diverseco en la vivmaniero kaj vivformoj, konservi unu komunan kulturon, kiu alie estus destinita por pereco kaj disfalo. La homa racio tiuokaze sciis konscie direkti la lingvokonstruon laŭ la al ĝi bezona vojo; per la kreo de la novaj lingvoformoj enkonduki en la vivon de certa kolektivo konscian kreelementon.

La naturaj lingvoj ekzistis, havis propran literaturon kaj memstaran evoluon. Kaj la artefarita Sanskrito ekzistis samtempe kaj paralele kun la lingvoj naturaj, kiel siaspeca helpa literatura lingvo.

Dank' al la flekseblo de la lingvokonstruo, fine priformita de P a n i n i , tiu ĉi lingvo ne pereis kaj daŭre ekzistas en la bramana literaturo ĝis nun.

**Lingua Geral** Troviĝas alia grava eksperimento de la lingvokonstruo, en la skalo de tuta duonkontinento; la hispanoj, al militintaj Brazilion, kun la celoj de pli intensiva ekspluatado de la lando, estis devigitaj interrilati kun la indiĝenoj, havintaj laŭ sia vivmaniero kaj historio nenion komunan kun la hispanoj. Krom tio ankaŭ la multenombraj, malsamaj dialektoj de la indiĝenoj malhelpis al la hispanoj en la plua konkerado de la lando. Ne atendente la venontan pogradan evoluon en la asimiliĝo de la lingvoj, la instruitaj jezuitoj, pioniroj de la hispana kulturo en XVI. jarcento, kreis la vortaron, alfabeton kaj gramatikon de lingvo facile akireblan por ambaŭ: hispanoj kaj aborigenoj. Tiu ĉi lingvo sub la formo de "Lingua Geral Brazilica" ekzistas en Brazilio ĝis nun, servante al la diversgenta kaj diverskolora loĝantaro de la centraj regionoj de Sudameriko.

(Daŭrigota.)

---

# Atentu!

Jen la adresoj de la tri fak-redaktoroj, al kiuj oni bonvolu sendi la koncernan materialon:

## **FAKO LITERATURA**

K-do *Nikolao Nekrasov*, 1-a Tverskaja Jamskaja, 35, kv. 5, *Moskvo* (Sovetio)

## **FAKO PEDAGOGIA**

K-do *Marcel Boubou*, 96, Rue St. Marceau, *Orléans*, Loiret (Francio)

## **FAKO SCIENC-TEKNIKA**

K-do *Gregoro Demidjuk*, Degtjarnij per. 5, kv. 6, *Moskvo 6* (Sovetio)

---

## **Tarifo de "La Nova Epoko"**

(La unua nombro montras jarabonon por membroj de SAT, la dua en krampoj montras la jarabonon por nemembroj. Ni ankaŭ akceptas ¼-jaran abonon)

Argentino, pes. 2 (3); Aŭstrio, ŝil. 4 (5); Belgio, belgo 3 (4); Brazilio, milr. 5 (7); Britio, ŝil. 3 (4); Bulgario, ley. 100 (150); Ĉeĥoslovakio, kr. 20 (25); Danio, kr. 3 (4); Estonio, kr. 2,50 (3); Finnlando, mk. 25 (30); Francio, fr. 15 (18); Germanio, mk. 3 (4); Hispanio, pes. 4 (5); Hungario, peng. 4 (5); Italio, lir. 15 (20); Japanio, jen. 2 (2,50); Jugoslavio, din. 40 (45); Latvio, lat. 3 (4); Litovio, lid. 6 (8); Nederlando, guld. 2 (2,50); Norvegio, kr. 3 (4); Polio, zlot. 5 (7); Portugalio, esk. 12 (15); Rumanio, lej. 120 (150); Sovetio, rubl. 1,50 (2); Svedio, kr. 3 (4); Svisio, fr. 4 (5); Usono, dol. 1 (1,50).

# Havigu al vi la novajn eldonaĵojn de l' SAT-Kooperativo!

---

## Jam aperis:

Fabeloj de Hermynia Zur Mühlen, Kion rakontas la amikoj de Peĉjo. "Bibl. de Sennaciulo", n-o 6  
Prezo: 0,60 mk. g.

E. Lanti, La Laborista Esperantismo. La necesa instrukleriga broŝuro de la gvidanto de SAT. 40 paĝoj.  
Prezo: 0,40 mk. g.

## Dum oktobro aperas:

Akademiano Fersman, La vojo al scienco de estonto. "Bibl. de Sennaciulo", n-o 7  
Prezo: 0,60 mk. g.

Protokolaro de la 8-a SAT-Kongreso (aŭg. 1928, Göteborg)

## Dum novembro aperos:

Diablidoj, Rakonto por la Junularo de N. Barthelmess. Kun titolbildo.

Prologo, Originala esp. versaĵaro de E. Miĥalski. 64 paĝoj. Kun titolbildo.

Por SAT-anoj 20 %-a rabato je ĉiuj verkoj escepte de Protokolaro

---

**Administrejo de SAT, Colmstrasse 1  
Leipzig O 27**